

# FERIO KUN LA MORTO

*Karl LINDQVIST*

## Enhavo

- [I. Enkonduko](#)
- [II. Gaja Renkonto](#)
- [III. La transmigrado de l'animoj.](#)
- [IV. Kie estas Ellen?](#)
- [V. Ni trovas Ellen.](#)
- [VI. La Rorschach-metodo, kiu montras nenion.](#)
- [VII. Alia persono malaperas.](#)
- [VIII. Mi fariĝas rompŝtelisto.](#)
- [IX. Sinjorino kun revolvero.](#)
- [X. Kiu povas kompreni virinojn?](#)
- [XI. Surprizatako, leteroj, novaj punktoj en la murdafero.](#)
- [XII. Grava interparolo.](#)
- [XIII. Apud la tombaltaĵo. - Mi kaptas la murdiston.](#)
- [XIV. Kion la gazetoj skribis.](#)
- [XV. Ĉu la inspektoro havu la lastan vorton?](#)

## I. Enkonduko.

Ĉu vi konas Danlandon? Ĉu vi iam estis ĉi tie? Ĉu vi vidis la malgrandan landon kun ĝiaj verdaj fagarbaroj, ĝiaj freŝaj marbordoj, ĝiaj bonhumoraj homoj, kiuj ĉiam ridas aŭ tre laŭte parolas; kiuj povas arde diskuti pri iu ajn temo dum horoj kaj poste trinki kafon unu kun la alia, multegan kafon; kiuj povas kune kanti naciajn kantojn kaj diri terurajn spritaĵojn -?

Danlando konsistas el multaj grandaj, mezgrandaj kaj etaj insuloj plus Jutlando, kiu estas duoninsulo, krom Gronlando, kiun neniu dano konas. La dana grundo estas ĉie fekunda - ĉie kreskas sukerbetoj, porkoj, bovoj kaj infanoj, amasoj da infanoj, kiuj ĉiam ludas sur la stratoj kaj ŝoseoj neatentante la trafikon. Ĉiuj ridas - ankaŭ la betoj. La herbo estas verda, la fagoj estas verdaj, la ĉielo estas verda - la tuta lando havas la Esperantan koloron.

Bedaŭrinde la somero ordinare estas mallonga, sed dum kelkaj semajnoj la suno brilas ĉarmege; ĉiuj homoj fariĝas brunaj kiel mulatoj; la tuta popolo iras al la marbordo por bani sin, kuŝi sur la strando kaj manĝi glaciaĵon.

Sed la plej bela estas la somera nokto, kiu estas nek hela, nek malhela, sed krepuska. Vizitu la landon komence de la somero, kiam la floroj de la sambuko odoras kaj la tuta aero estas plena de paradiza ĉarmo.

La lando estas paca, la homoj pacamaj. Iam fremda diplomato promenis sur la stratoj de Kopenhago, la ĉefurbo. Li tiam ekvidis rajdiston rajdanta sola tra la urbo. Li estis altstatura sinjoro kaj rajdis malrapide; kaj ĉiuj homoj salutis lin respektplene.

La diplomato miris kaj demandis al dano: »Kiu estas la rajdisto, kiun ĉiuj homoj konas kaj salutas? «

»Tio estas nia reĝo,« la dano respondis.

»Sed li ja estas tute sola! Kie estas la soldatoj, la polico? Kiu gardas lin?« »Kiu? Kompreneble ni ĉiuj!« diris la dano.

La konata rajdisto estas nun mortinta, sed la cirkonstancoj estas la samaj koncerne la novan reĝon. La reĝino ekzemple ofte veturigas sian propran aŭton sen eskorto.

Oni ne imagus, ke en ĉi tiu pacama lando povas okazi murdo, sed la fakto montras, ke ankaŭ ĉi tie estas kelkfoje »rabistoj en la verda arbaro«, kiel la infanoj kantas. Mi mem spertis tion - mi, absolute pacama, ordinara viro, mezaĝa dano, seninteresa, iomete flegma, sen specialaj talentoj, ne tre kuraĝa kaj ne tre inteligenta.

Fakte mi vivis dum tri semajnoj kune kun la morto - kvankam mi ne sciis tion. Mi havis tiam malagrablajn tagojn, kiujn mi neniam povos forgesi.

Ĉi tie mi volas rakonti pri la afero, sed mi devas konfesi, ke mi ne scias rakonti elegante aŭ ekscite, ĉar mi ne estas verkisto; kiel dirite, mi estas nur simpla homo, kiu tute hazarde venis en okazaĵojn, kiujn mi tiam tute ne komprenis.

Kaj tamen mi - jes, mi! - kaptis la murdinton. Malgraŭ la inteligenta polico, la tre inteligenta inspektoro, mia malnova amiko, malgraŭ ĉiuj, mi sola kaptis la krimulon!

Mia nomo aperis en ĉiuj gazetoj de nia lando - jes, ankaŭ en kelkaj gazetoj eksterlandaj. Eble vi vidis ĝin, sed verŝajne vi jam antaŭ longe forgesis kaj la nomon kaj la okazaĵojn. Okazas nuntempe ja tiom multe en nia mondo, tro multe.

Sed nun mi volas rakonti la historion, kaj mi esperas, ke vi ne trovos mian rakonton tro seninteresa.

## **II. Gaja renkonto.**

Ni komencas en Kopenhago, sur Amagerplaco, kie okazas foiro. La tago estis bela; ĉirkaŭ mi brilis la frua somero: - la kamparo loĝis ĉi tie sur la pavimo; la suno verŝis siajn kisojn al siaj florinfanoj, kaj ankaŭ al la nedankemaj kreaĵoj, kiujn oni nomas homoj.

Kaj mi staris tie kaj estis agrable libera. Mi povis vidi la florojn kaj ĝoji pri la beletaj Kopenhagaj sinjorinoj, kiuj ne nur estis tre okupitaj pri la aĉeto por la tagmanĝo, sed ankaŭ havis tempon kaj penson por la animo kaj tial aĉetis kelkajn florojn.

Mi denove fariĝis juna studento; la jaroj kaj la laboraj tagoj malaperis; mi revis pri la bela tempo de mia junaĝo.

Aĥ, la tempo pasas tre rapide, kaj oni iĝas maljuna...!

Tiam mi subite aŭdis voĉon:

- Bonan tagon, kara amiko! Kiu estas la feliĉa sinjorino?

Mi turnis min - jes, vere: estas la inspektoro Groner, mia malnova amiko, kiun ni ne vidis dum multaj jaroj - grizhara, eleganta, juneca.

Li knabece ridetis al mi.

- Feliĉa, mi respondis. Mi mem estas feliĉa pro tio, ke mi povas esti ĉi tie, libera, sana, neokupita....

- Vi devas honti pro tio, Svend, li diris. Ĉi tie ni staras en la mezo de nia kara, bela ĉefurbo, kaj ĉirkaŭ ni ridetas kaj ridas la plej belaj Kopenhaganinoj. - Kiom kostas la floroj tie?

La lastan demandon li direktis al unu el la multaj florvendistoj, kiu kun amika rideto diris la prezon.

- Bone, mi prenas ilin. Nun vi vidos, kara Svend, kion oni devas fari, kiam oni vizitas nian urbon kaj la florantan foirejon: oni devas nepre doni florojn al bela sinjorino. Venu!

Kaj li foriris per rapidaj paŝoj. Mi sekvis lin malpli rapide. Sur la trotuaro ĉiuj homoj rapidis hejmen; estis la horo, kiam oni fermas la kontorojn.

Malgranda sinjorino alvenas. Ŝi estas maldika, kaj jam antaŭ longe ŝi preterpasis la junecon; ŝia vizaĝo estas bela, sed iom amara. Unu el ŝiaj piedoj estas difektita, kaj tial la vivo preteriris ŝin, kiel nun la trafiko faras. Oni povas vidi, ke ŝi konsideras la estadon malsukcesa. Ŝia eksterajo rakontas tutan historieton: - Ŝiaj kolegoj atingis hejmon, edzon, infanojn, estetikon kaj amon, sed ŝi restis sola de jaro al jaro. Ŝi laboris fidele, estis laŭdata kaj ricevis salajraltiĝon - kaj ĉiuvespere ŝi povas hejmeniri al sia bela, sed trista apartamento, ŝi povas aŭskulti la disaŭdigon de la radio, eble revii iomete pri tio, kio povus esti...

Sed subite ŝi aŭdas voĉon, plenan de forto, suno kaj aventuro, kaj vidas helan rideton lumigi ŝian tedan tagon:

- Bonvolu, kara fraŭlino !

Ĝi estas tiu de la inspektoro Groner.

Ŝi ekrigardas lin suspekta - kutimiĝinta al la moko de la mondo. Sed, kio estas tio? Neniu moko, neniu rido, nur distingiga sinjoro kun mildaj okuloj. Li riverencas antaŭ ŝi kaj donas al ŝi la florojn.

- Jes, vi devas preni ilin; ili estas por vi.

Kaj la suno trapenetras la nebulojn de ŝia mondeto; ŝi ridetas kaj diras flustre dankon. Kaj kun la bukedo ĉe la brusto ŝi daŭrigas sian promenon; ŝi tute forgesas la difektitan piedon; ŝi preskaŭ ne lamas.

- Tiel, diris la inspektoro, tiel oni devas utiligi la florojn!

.... Kaj li pravis - ĉu ne?

\*\*\*

Post duona horo ni sidis en restoracio kaj trinkis glason da biero.

- Je via sano! salutis min la inspektoro. - Bonege, ke ni, du malnovaj amikoj, renkontiĝis ĉi tie en nia kara Kopenhago. La vivo pasas, dum kiam oni laboras kaj laboras; estas necese havi ferion kelkfoje. Antaŭ kiom da tempo vi havis ferion lastfoje. kara Svend?

Mi meditis unu momenton. Vere, tio estis antaŭ longe, antaŭ multaj jaroj. Mi konfesis tion.

- Mia sorto estas la sama, li diris. Ni, du taŭgaj kaj bonaj viroj, laboras jaron post jaro sen paŭzoj. Estas

absurde, tute absurde. Ni devus havi ferion - kaj ni devus pasigi la ferion ĉe la maro en agrabla komforta pensiono kun belaj sinjorinoj. Devus esti tie granda ĝardeno kun agrablaj seĝoj, bona vetero kaj tiel plu.

- Tiam ni devus elekti la pensionon »Marbordo«, mi respondis.

- Mi petas -- mi ne komprenas vin?

Mi transdonis al li gazeton, kiun mi hazarde trovis sur la tablo, kaj montris anoncon.

- Legu, mi diris, kaj fariĝu saĝa !

Kaj Groner legis: *»Vizitu la pensionon »Marbordo«! Granda, ombra ĝardeno, ĉia komforto, bona banstrando, ĉarmaj pinoplantejoj, rajto fiŝkapti en proksima rivero.«*

La inspektoro atente tralegis la anoncon, post kio li diris:

- Mi imagas la ombran ĝardenon, la riveron plenan de fiŝoj; mi preskaŭ povas flari la marakvon. Mi ekhavas ideon: Ni iru al »Marbordo« kaj pasigu tie du-tri semajnojn pace kaj agrable - ĉu ne? Kion vi opinias?

- Bona ideo. Mi akceptas.

.... Kaj tiel komenciĝis - malproksime de ĉia krimo - mia unua kaj sola murdhistorio. La inspektoro telefonis al la menciita pensiono kaj mendis por ni ĉambrojn; - post du horoj ni ambaŭ sidis en la trajno survoje al ferio, banstrando, somersuno kaj - nekonataj okazaĵoj.

### **III. La transmigrado de l'animoj.**

- Kompreneble, mi diris, kie la sinjorinoj estas, tie estas ankaŭ la inspektoro!

La tago estis, kia somertago devas esti: varma, sunbrila. La ĝardeno estis granda kaj tre bela; vastaj razenoj, altaj arboj, multaj benkoj - kaj mi havis somerferion; jes, post multaj jaroj da laboro mi nun havis ferion. Kaj mi atendis tri ĉarmajn semajnojn.

Estis nur la dua feria tago. La somerpensiono estis bona, la ĉirkaŭo estis interesa; ĝi konsistis el idiliaj plantejoj, kie oni povus trovi solecon kaj pacon.

Gaja virina rido renkontis miajn vortojn.

- Venu! la sinjorinoj vokis min - Venu kaj aŭskultu! La inspektoro rakontas treege interese pri transmigrado de la animoj. Mi iom konfuziĝis: la inspektoro kaj la transmigrado de la animoj! Dum multaj jaroj mi bone konis lin, sed li neniam elparolis eĉ la plej malgrandan vorton pri sia anima intereso.

Nu, mi eksidis, ekbruligis mian cigaron - kaj aŭskultis.

La inspektoro daŭrigis sian rakonton:  
- Kiel mi diris, miaj belaj sinjorinoj, antaŭ multaj jaroj mi vivis kaj laboris sur la Bermuda-Insuloj, kies nomon vi certe konas, ĉu ne ? Tie mi havis bonan, malnovan amikon nomatan Peter.

Mia bona amiko estis edziĝinta al juna, tre bela gaja sinjorino. Li posedis ĉiun feliĉon de la tero: riĉecon, amindan edzinon kaj fidelan amikecon - nome la mian.

Mi tre ofte vizitis la feliĉan paron, kaj ni multfoje diskutis pri religiaj aferoj. Peter kaj lia edzino kredis je transmigrado de la animoj, sed mi estis absolute skeptika...

Aĥ, kiom mallonge daŭras la homa feliĉo! Subite mia kara Peter mortis, kaj lia kompatinda edzino iĝis sola.

Kaj nun vi aŭdos pri stranga okazaĵo: Post ĉirkaŭ unu semajno la vidvino alvokis min, kaj kompreneble mi venis kiel eble plej rapide, ĉar la sinjorino estis - kiel mi jam diris - ĉarmega. Ĉiuj virinoj estas ĉarmaj, sed vidvinoj estas simple ravegaj.

Seke mi alvenis al ŝia bieno, plena de entuziasmo kaj homamo; sed tiun vesperon mi spertis ion, kion mi ne komprenis kaj ankaŭ nun, plurajn jarojn poste, ne komprenas...

La inspektoro paŭzis, sed la sinjorinoj estis senpaciencaj; kelkaj el ili kriis: - Bonvolu daŭrigi!

- Jes, nur paciencu, miaj karaj sinjorinoj, baldaŭ vi scios ĉion. - Komence mia vizito farigis plena malsukceso; la ĉarma sinjorino ne deziris mian konsilon; ŝi volis ankaŭ estonte peti konsilon de sia edzo.

- Li ja mortis, interrompis la aŭskultantoj.

Jes, sed per spiritismo ŝi volis peti konsilon. Mi ja diris, ke la geedzoj kredis je transmigrado de la animoj; nun la vidvino volis atingi kontakton kun la kara mortinto, kaj mi devis ĉeesti la seancon.

Mi ne scias kial, sed estas fakto, ke la fantomoj ŝatas mallumon kaj malamas la klaran tagon. Tial la bela sinjorino kaj mi eksidis sur la verando kaj atendis la senkorpan amikon.

La tempo pasis. En la nokto la mallumo estis kompakta. Ĉio estis kvietita, senbrua. Mi deziris fumi, sed ne kuraĝis - oni ja ne scias, ĉu la fantomoj ŝatas cigarfumon.

Tiam okazis la nekompreneblaĵo: stranga brileto aperis en la mallumo tre proksime al la pordo de la dormoĉambro. Mi sidis senbrue; miaj haroj hirtiĝis; la sango glaciigis en miaj vejnoj; mi ne kuraĝis paroli, ĉar la sinjorino estis ordoninta silenton, plenan silenton.

Nun la sama la sinjorino ekdiris:  
- Ĉu estas vi, Peter?

Kaj el la brileto venis voĉo:  
- Jes, estas mi.

- Ĉu vi fartas bone? demandis la sinjorino.

Kaj Peter respondis: - Mi fartas bone; la herbo estas verda; la birdoj kantas en la arboj; la vento estas milda; kaj la okuloj de la bovinoj estas dolĉaj kaj belaj.

- Sed, mia kara Peter, kie vi estas? Ĉu vi estas en la paradizo ?

Paŭzo. Tiam la voĉo de Peter sonis tra la malluma verando:  
- Mi estas virbovo en Argentino.

La inspektoro silentis. Kelkaj el la sinjorinoj ridis, aliaj minacis al li; nur sinjorino Kink, kiu venis el Ameriko, komprenis nenion.

- Kio okazis poste? ŝi demandis tute serioze.

- Ne demandu pri tio, kara sinjorino, diris la inspektoro.

- La malfeliĉa - aŭ feliĉa - Peter malaperis, kaj la juna vidvino ne havis pli da seancoj. Post duona jaro ŝi edziniĝis al sia asistanto, kaj nuntempe ili havas dek infanojn - jen la rezulto, kiam oni kredas je transmigrado de la animoj.

- Fi! Hontu! diris alta, forta sinjorino. Sed la aliaj sinjorinoj ridis kaj ridegis. Ili rigardis la petolan inspektoron admire.

\*\*\*

En ĉi tiu momento malfeliĉa voĉo sonis tra la ĝardeno:  
- Ĉu Ellen estas ĉi tie? Ĉu iu vidis mian filinon?

La vigla kaj senzorga atmosfero subite malaperis. La aero iĝis strange malvarma malgraŭ la suno kaj la somero. Glacia venteto blovis tra la ĝardeno. Mi ekhavis malagrablan antaŭsenton.

Eĉ la inspektoro farigis serioza. Li levis sin de sia agrabla ĝardenseĝo.

- Kie kaj kiam vi vidis vian filinon laste? li demandis.

- Je la unua, post la tagmanĝo. Ŝi iris promeni, kaj poste neniu vidis ŝin. Jam antaŭ du horoj ŝi devis reveni...

## IV. Kie estis Ellen?

Kie estis Ellen? En la komenco ni opiniis, ke ŝi nur malfruas. Junaj fraŭlinoj ja povas forgesi la tempon, precipe kiam la tago estas tiom bela kaj varma.

Sed la tago pasis, la vespero venis, kaj ŝi ankoraŭ ne aperis. Ŝiaj gepatroj kompreneble treege maltrankviliĝis. Ni serĉis ĉie, sed vane. Ŝi estis for kaj restis for.

Ellen havis dek ok jarojn. Ŝi estis ordinara juna fraŭlino kun blondaj haroj kaj ruĝaj lipoj. Mi trovis nenion rimarkindan ĉe ŝi. Laŭ mia opinio ĉiuj junaj fraŭlinoj similas unu al la aliaj, sed mi ja estas nejuna viro meze en la vivo.

La patro de Ellen estis prokuristo, malalta, maldika, malparolema - kaj tial tre simpatia.

- Ni serĉu! diris la inspektoro al mi post la vespera kafo.

- Jes, sed ni ja serĉis antaŭe sen rezulto. Ĉu vi opinias, ke vi nun trovos ŝin en la mallumo? mi kontraŭdiris.

Li skuis la kapon.  
- Ne, sed mi ne povas sidi senage; mi volas esplori la aferon; eble...

- Kion vi opinias per »eble«?

- Nenion.

Ni eliris. La nokto estis klara, la luno brilis bele, kaj la firmamento estis tute plena de steloj.

- Bona amiko, kiom bela estas la tero, jes, la tuta mondo - nur la homoj havas mil ĉagrenojn. Vidu ĉi tie en la pensiono: Ĉio estas bona, eĉ la vetero, sed jen, Ellen malaperas, kaj ni timas, ke iu krimulo mortigis ŝin...

- Ĉu vi certe kredas... ?

- Mi absolute ne kredas aŭ opinias ion certa. Kio estas certa? Ne, sed oni devas esplori ĉion, ĉiujn eblecojn. Eble ŝi nur promenis, iradis tro longe kaj aperos baldaŭ - sed miaj sentoj diras al mi, ke ne estas tiel. Oni ĉiam devas fidi al siaj sentoj. Mi sentas danĝeron, kaj de mia restado sur la Bermuda-Insuloj mi havas spertojn...

- Jes, mi jam scias! mi interrompis.

Kiam la inspektoro komencas paroli pri la Bermuda-Insuloj, oni malfacile povas haltigi lin, kaj li havas »spertojn« pri ĉio.

- Se estas murdo, mi daŭrigis, kiu povus esti la murdinto?

- Nu, unue ni devas konstati, ke ni scias nenion. En ĉi tiu momento ni ne scias, ĉu okazis murdo. Ni ne scias, kie Ellen estas, kaj ni ne konas la diversajn homojn en la pensiono kaj en la ĉirkaŭaĵo. Vi demandas, kiu povus esti murdinto. Fakte iu - ankaŭ vi kaj mi. Ĉiu homo povas fariĝi murdinto en iuj fatalaj cirkonstancoj.

Sed kiu povus - jes, ni rigardu iomete niajn kunloĝantojn. Tio povas esti praktika kaj utila. - Ni do havas la gepatrojn de Ellen, la prokuriston Nordh kaj lian edzinon. Ili estas ordinaraj, simplaj homoj; ili pagas siajn impostojn honeste kaj gaje, kaj la filino estas ilia granda feliĉo kaj espero.

Kaj la paro Kink: - Ĝentila kaj modesta viro kaj malinteligenta, fieraĉa virino, kiu tiranas sian edzon terure.

La aliaj sinjorinoj estas sufiĉe signifikaj, escepte de fraŭlino aŭ sinjorino Makir, la fremda aktorino. Ŝi estas iomete mistera. Kaj inter la viroj mi trovas la kortserviston John iom suspekta; li estas tro servofervora; nuntempe oni malofte trovas servemajn homojn, ĉu ne? Ankaŭ niaj gemastroj estas iom neordinaraj - la mastrino estas vera mastrino, dika kaj energia, sed ĉu vi vidis ŝian edzon? Li ŝajnas timema; li ŝteliras tra la pensiono kiel ombro de si mem...

Lia parolado rompiĝis pro bruo en la nokto; iu persono ekkriis ion, kion mi ne komprenis, kaj mi aŭdis kurantajn paŝojn en la mallumo; la paŝoj alproksimiĝis; la voĉo fariĝis pli laŭta, la vortoj pli klaraj.

- Ellen! la viro kriis. Mi trovis ŝin. Ŝi esta mortinta. Venu - helpu min - ŝi estas mortinta - - !

## **V. Ni trovas Ellen.**

La alkurinto estis tre juna sinjoro, kiun mi ne konis, kvankam ŝajnis al mi, ke mi vidis lin inter la pensionanoj. Lia vizaĝo estis tre pala, kaj liaj manoj tremis.

- M-m-i preterpasis ĉi tiun parton de la plantejo ne rimarkante ion, li rakontis. Sed io en mi - mia koro - haltigis min. Mi iĝis maltrankvila kaj strange timema. Tiam mi iris en la arbaron kaj apud la pratempa tombaltaĵo -- tie mi trovis -- ŝin...

Li ne povis daŭrigi, tiom tremis lia voĉo. - Kaj ni venis al la loko.

Jes, Ellen estis mortinta. Pri tio estis nenia dubo. Kaj fakto estis ankaŭ, ke ne pro malsano ŝi mortis. La

vespero estis tre malluma ĉi tie inter la pinoj, sed la inspektoro kunportis elektran lanternon.

La inspektoro estis silenta. Li klinis sin kaj esploris ĉe la lumo de sia lanterno la mortinton. Mi ne turnis min al alia flanko; mi ne volis vidi la senvivan junan fraŭlinon, kiu kuŝis sur la tero. Unu rigardo sufiĉis al mi.

Post tempo, kiu ŝajnis al mi tre longa, la inspektoro rektigis sin kaj trankvile diris:

- Sinjoroj, mi volas resti ĉi tie, dum kiam vi iros por telefoni al la polico. Estas nepre necese, ke la polico venu, sed vi alvoku ĝin diskrete. Faru tion tiel, ke la gepatroj ne aŭdu pri la afero. Plej bone estas telefoni de loko proksima. Mi vidas solan telefondraton super niaj kapoj. Sekvu ĝin. Eble ne malproksime estas domo, kie vi povas telefoni. Estas malfrue, sed la afero estas tiom grava, ke oni rajtas vekigi dormantajn homojn. Sed rapidu! Ĝis revido!

Ni iris. La juna sinjoro rapidis; li preskaŭ kuris, kaj mi sekvis lin ŝvitante kaj senspire. La drato iris tra la densa plantejo. En la mallumo ni povas ĝin malklare videti.

Tre longe ni iris tiel, ne interparolante, ambaŭ okupitaj pri la murdafero.

Fine ni vidis somervilaon, kien la drato malaperis. Mi faris ekspiron de faciliĝo - finfine la celo!

La vilao estis tre granda, kaj ĝi situis proksime al la maro; ni aŭdis la ondplaŭdadon de la marbordo. Cetere ĉio estis senbrua, silenta, preskaŭ malbonaŭgure silenta. La tuta vilao kaj ĝia ĉirkaŭaĵo dormis.

Sed subite hundo komencis boji. Kompreneble - oni havas hundon ĉi tie. La loko ja estas terure dezerta, sed kiamaniere ni atingu la domon?

Ĉirkaŭ la vilao estis granda ĝardeno kun solida barilo. Mi iris singarde al la pordeto kaj kriis laŭte:

- Ĉu iu estas hejme? Ni bezonas telefoni. Estas tre grava afero!

Jen - bone ! - estis homoj en la vilao; lampo eklumis, kaj nun eksonis virina voĉo en la kvieta nokto:

- Kiu estas tie?

Mi ripetis miajn vortojn pri la telefono.

- Ĉu ni rajtas alproksimiĝi? mi demandis. Ni timas vian hundon. Ĉu ĝi ne mordas?

La virino vokis la hundon, kaj ni eniris tra la pordeto.

Mi rakontis per malmultaj vortoj pri Ellen kaj petis permeson por uzi la telefonon.

- Jes, jes, la virino respondis. - Venu - venu - estas terure - kaj proksime al nia vilao! Eble la murdinto ankoraŭ estas ĉi tie!

- Ne, ne, mi trankviligis ŝin. Laŭ mia opinio li estas for. Resti ĉi tie estas tro danĝere al li. Li certe estas malproksime. Ĉu vi loĝas sola ĉi tie?

La sinjorino klopodis rideti.

- Ne, mi logas ĉe sinjoro Bang, la posedanto de la vilao. La malfeliĉa sinjoro estas kriplulo; liaj gamboj estas paralizitaj. Mi estas lia mastrumistino kaj flegistino. Li povas movi sin nur per rulseĝo. Mia nomo estas



Erna Holt.

Ŝi etendis al mi la manon, kaj mi diris mian nomon. Ŝia vizaĝo estis tre pala.

Mi telefonis, dum kiam la fraŭlino kaj mia akompananto mallaŭte interparolis. Mi klopodis kiel eble plej bone klarigi la aferon, la vojon kaj la lokon, kaj fine mi sukcesis, kvankam mia respekto al la intelekto de la polico ne pligrandiĝis ĉe la telefonado.

- Eble mi devus saluti vian sinjoron kaj danki lin, mi poste diris al fraŭlino Holt. Sed ŝi opiniis, ke tio ne estas necesa.

- Mia malfeliĉa sinjoro pro sia malsano estas iomete homevitema. Mi poste rakontos al li ĉi tiun malgajigan aferon kaj donos al li vian saluton, ŝi respondis.

Mi aŭdis bruon de la subtegmento. Iu tusis.

- Tio estas mia sinjoro, diris fraŭlino Holt. - Mi devas supreniri por trankviligi lin. Certe li estas iom timigita pro la fremdaj voĉoj kaj la bojado de la hundo.

Ni adiaŭis fraŭlinon Holt kaj foriris.

- Kio estas via nomo? mi demandis al la juna sinjoro. Ĝis nun mi ne atentis, ke mi ne scias tion.

- Hansen, li diris, la ordinara dana nomo Hansen.

- Vi konis Ellen?

- Jes, kaj mi amis ŝin. Ŝi estis tiom bela kaj bona! Mia koro estas - - nu, mi ne volas paroli pri tio, sed mi volas trovi la bruton, kiu murdis ŝin.

- Sed kiu faris tion?

- Mi ne scias, kaj mi suspektas nenium, sed mi volas solvi la misteron.

\*\*\*

La inspektoro estis sur la sama loko, kie ni forlasis li. La polico ankoraŭ ne alvenis, sed baldaŭ ni vidis fortajn aŭtomobillanterojn, kaj ambulancosirenoj akre sonis tra la nokto.

De nun la murdo estis oficiala afero.

## **VI. La Rorschach-metodo, kiu montras nenion.**

Dum la nokto mi kompreneble sonĝis terure. Mi vidis la junan Ellen, kiu en mia sonĝo veturis en rulseĝo; iu tre granda hundo bojadis - kaj la hundo similis sinjoron Hansen.

Mi vekigis tre malfrue kaj malsupreniris por matenmanĝi.

Neniu estis en la mangoĉambro, sed mi aŭdis tra malfermita pordo multajn voĉojn el la ĝardeno - inter ili la voĉon de la inspektoro. Ŝajnis, ke li estas tre vigla, ĉar li ridis forte kaj parolis tre laŭte.

- Bonan matenon; kiel vi fartas? sonis lia saluton, kiam mi post la manĝo eliris en la ĝardenon.
- Dankon, tre malbone! mi respondis.
- Ĉu vi scias, ke la polico volas juĝesplori nin hodiaŭ?

Mi ne sciis, sed tion oni ja povis atendi. - Nu - la juĝesploro okazis dum la antaŭtagmezo, kaj ĉiuj pensionanoj farigis terure nervozaj. - Kie oni estis posttagmeze la pasintan tagon? Kion oni faris dum la vespero? Kiu povas respondi tiajn demandojn? Tio estas plej ofte neebla.

Al sinjoro Hansen estis absolute neeble respondi ilin. Li implikis sin en kontraŭdirojn, kaj la rezulto estis, ke la polico arestis lin.

Fine la polico forveturis, kaj en la pensiono estiĝis granda, malagrabra kvieto. La funebro kaj doloro de la gepatroj de Ellen estis korŝira. Ni ĉiuj sentis, ke la ombro de la morto malheligas nian ordinare tiom gajan restadon.

Ĉu sinjoro Hansen faris la malbonan agon? Mi ne volis kredi tion. mi ne povis kredi tion. Kaj tamen! Kial li ne rakontis, ke li vidis Ellen kaj akompanis ŝin antaŭ la murdo? Al la polico li devis post multaj kontraŭdiroj konfesi, ke ĉi tio okazis. Li estis la lasta persono, kiu vidis ŝin vivanta - eble escepte de la murdinto.

Sed kiu povus esti farinta tion? Ĉu iu en la pensiono? La inspektoro aludis, ke la kortservisto estas nefidinda - kaj ankaŭ la fremdlanda aktorino Makir, sed ĉu li efektive opiniis tion?

La kortservisto tute ne similis murdinton, kaj la mistera aktorino efektive ne estis mistera; ŝi nur aspektis iom aparta.

- Sed kie estis la inspektoro? Ofte li malaperis; dum longa tempo mi ne vidis lin; ŝajne li estis tre okupita, sed pri kio? Ĉu li suspektis iun?

Mi iris al la marbordo, kie dum la tuta longa tago amaso da homoj ĉeestis kuŝante sur la flavblanka sablo. La sinjorinoj maldiligentadis preskaŭ nudaj - nur etaj »figfolioj« kovris malgrandan parton de la brunaj korpoj.

Kiu el ĉi tiuj murdis Ellen? Aŭ ĉu neniu? Ĉiuj aspektis amikaj, pacamaj, honestaj, absolute ne murdemaj.

Mevoj flugis malrapide tra la aero. La ondoj murmuris mallaŭte. Ĉi tie oni ne povis imagi murdon kaj krimon.

Kiam mi revenis al la pensiono, mi trovis la inspektoron en la ĝardeno, kie li sidis meze de grandnombra grupo da gesinjoroj.

- Venu, sinjoro! kriis juna sinjorino. La inspektoro eltrovis novan ludon tre interesan.

Mi proksimiĝis al la grupo. Sur tablo mi vidis paperfoliojn kun tre strangaj figuroj. La inspektoro skribis en malgranda nigra libro, dum kiam unu post la alia el la grupo venis al la paperfolioj, rigardadis ilin kaj murmuris ion - mi komence ne aŭdis kion.

- Ankaŭ vi, Svend, diris la inspektoro. - Ĉi tio estas konkuro. Vidu - antaŭ vi estas paperfolioj kun bildoj. Kion vi vidas? Kion prezentas la bildoj? Nu, diru! parolu! Kiu povas eltrovi plej multe da bildoj, tiu ricevos premion, sed mi ankoraŭ ne volas malkaŝi, kio estas la premio.

- Stultaĵo! mi ekridis. Tio ja estas nur inkmakuloj.

- Jes. la inspektoro konfesis. vi pravas: tio estas inkmakuloj, kaj ili havas diversajn konturojn kaj kolorojn, kiuj formas diversajn bildojn, ĉu ne?

Mi rigardis pli atente; jes, la inkmakuloj formis bildojn, kiam oni sufiĉe longe rigardis ilin. Mi ekvidis unu, kiu similis vesperton, kaj alia similis du malgajajn virinojn, k.t.p.

- Bone, bonege ! kriis la inspektoro. - Kaj nun, sinjorino Kink, estas via vico.

Mi komprenis absolute nenion. Kio estis la intenco de la inspektoro? Mia konvinko estis, ke li tute ne ŝercis. Li certe estis ŝercemulo, sed tamen - liaj okuloj ne estis ŝercemaj.

Sed - inkmakuloj kaj krimo! Ne, mi komprenis nenion.

\*\*\*

Vesperiĝis. El proksima dancejo la muziko vokis la gejunulojn, dum kiam la pli aĝaj promenadis laŭlonge de la marbordo aŭ en la plantejoj.

Ĉie oni aŭdis voĉojn, trankvilajn, gojajn.

La inspektoro kaj mi sidis sur benko malproksime de nia pensiono. Mi estis ambaŭ kelktempe silentaj.

- Nu, kial vi faris la strangan teatran prezentadon kun inkbildoj? mi fine demandis.

- Nur ŝerco kaj distraĵo.

- Ĉu vi opinias, ke mi estas idioto?

- Iomete, sed ne tute. Nu, kara amiko, por esti sincera: mia prezentado ne estis ŝerco. Vi pravas. Ĝi estis la Rorschach-metodo.

- Kia metodo?

- La Rorschach-metodo, li respondis. Eble vi ne konas la vorton de psikodiagnostiko? Vidu: Rorschach estis sviso, mortinta en 1922, sed antaŭ sia morto li eltrovis interalie la metodon de inkmakuloj, per kiu oni povas difini la diversajn tipojn, kiujn ni trovas inter la homoj: la pedantan, la fantaziplenon k.t.p. Same la metodo povas malkovri misformiĝintajn animojn statojn. Mi volas konfidi al vi, ke vi mem estas relative normala. Sed plej grave estas. ke ĉi tiu metodo povas senvualigi la konscion de la homo - do ankaŭ la memorojn de la konscio, same kiel ekzemple la sonĝoj povas. Vi devus scii iomete pri la psikiatrio, sinjoro! Nu, dum kiam miaj karaj kunloĝantoj rakontis, kion ili vidas sur la paperoj - efektive la bildoj estis ja nur makuloj sen iu ajn senco - ili rakontis pri si mem, pri sia subkonscio. Ili malkaŝis sin mem. Se unu el ili estus la murdinto, mi povus tion eltrovi.

Mia interesiĝo pli kaj pli grandiĝis.

- Kaj vi eltrovis.... ?

- Mi eltrovis nenion - kaj tamen ion. La murdinto de Ellen ne loĝas inter ni en la pensiono, pri tio mi estas tute certa.

- Sed vi eltrovis ion?

- Jes, kelkaj el niaj karaj kungastoj estas iom misteraj, kiel mi jam diris. Kaj ili eble havas kontakton kun la murdo aŭ la murdinto. Mi volas esplori la tutan aferon, kaj mi esperas...

Mi neniam eksciis, kion la inspektoro esperis, ĉar en la sama momento laŭta krio venis el la malhela plantejo proksime al nia benko.

## VII. Alia persono malaperas.

- Kio estas tio?

Ni ambaŭ eksaltis de la benko kaj kuris en la plantejon. Nun ĉio estis senbrua. Nur sola birdo pepis en la arbetaro. Mi sentis korpremitecon: Ĉu nova murdo? Nova mistera kaj terura krimo?

- Kio do okazas? laŭte kriis la inspektoro.

Neniu respondis, sed nun mi aŭdis ion. Branĉo rompiĝis, kaj iu iris ie proksime en la plantejo. Ŝajnis al mi, ke la nekonata persono foriras.

Ni rapidis. Ni postkuris la misteran personon - jes - tie - mi ekvidis somerrobbon. Estis virino. Kompreneble. Ja ankaŭ la voĉo estis virina. Dank'al Dio - ĉiuokaze ŝi estas viva. Sed kial ŝi kriis?

Ni akcelis niajn paŝojn kaj baldaŭ ni atingis ŝin.

- Bonan vesperon, sinjorino Makir! la inspektoro salutis ŝin. Vi iras tre rapide. Ĉu estas vi, kiu kriis?

Ŝi haltis kaj salutis nin ridetante.

- Bonan vesperon, sinjoroj! Jes, mi kriis - pardonu min! Mi subite ektimis. La plantejo estas tiom soleca kaj senhoma, kaj ŝajnis al mi, ke mi aŭdas personon proksime al mi malantaŭ arbo. Tion kaŭzis miaj nervoj. Ni ja ĉiuj estas treege timaj nuntempe. Sed feliĉe estis nur mia fantazio, kiu trompis min.

Mi rigardis ŝin atente. Ŝiaj vortoj estis fluaj. Ŝi parolis kun iom fremda akcento, kaj ŝi ridetis tre multe, eble tro multe. Ŝiaj lipoj estis fajrokoloraj; ŝi ne estis juna, nek maljuna, sed havis nedifineblan aĝon inter tridek kaj kvindek. Svelta, bela - sed - mi ne povis klarigi la impreson pri io fatala. La francoj parolas pri »la femme fatale«, la virino fatala, tia estis sinjorino Makir.

- Ĉu vi permesas al mi akompani vin al nia pensiono, por ke vi ne plu timu? demandis la inspektoro kun gaja rido, kaj ŝi jesis amike kaj - ŝajnis al mi - kun kvietiĝo.

Sed kial ŝiaj okuloj aspektis iom maltrankvilaj, eĉ preskaŭ timaj? Kaj ĉu ŝi parolis la veron?

Ni promenis malrapide returne al nia pensiono gaje interparolante. La inspektoro estis - kiel ĉiam - tre vigla kaj rakontis gajajn historietojn kaj anekdotojn. La atmosfero estis kora, absolute kora - kaj iomete flirta.

Iom post iom mi fariĝis silenta, ĉar mi profunde meditis pri la afero. Mi ne komprenis la viklecon de la inspektoro. Sinjorino Makir ofte ridis tre laŭte. Ŝajne ŝi tute ne timis ion - sed kial ŝi ĵus klopodis fuĝi antaŭ ni?

Ĝojaj salutoj renkontis nin, kiam ni eniris la varmetan ĝardenon de la pensiono. Multaj el la pensionanoj

sidis ekstere en la ĝardeno ĝuante la bonan veteron.

Baldaŭ ankaŭ la inspektoro sidis inter ili, fumante sian cigaron kaj ŝercante kun la sinjorinoj. Oni ne povus kredi, ke antaŭ nelonge okazis murdo.

- Rakontu! petis la sinjorinoj.

- Jes, donu al ni gajan historieton! Vi konas tiom multe da humoraj anekdotoj, kaj ni bezonegas humoron!

La inspektoro ridetis.

- Nu, li diris, sed kiu ne povas elteni la fumon, devas forlasi la kuirejon, ĉu ne - Do, mi volas rakonti, sed pri kio? Jes, nun mi trovis la temon! Gesinjoroj, mi rakontos al vi pri malbona edzo. Ĉiuj edzoj en nia pensio kompreneble estas bonaj - same kiel la edzinoj estas.

Sed Beck estis - jes, fakte li estis ĉio kun »mal«: malbona, maldiligenta, malhonesta kaj tiel plu. Krome li estis ne nur drinkulo, sed drinkegulo. Li estis ebria de mateno ĝis vespero. Li ordinare ne havis laboron, kaj li batis sian kompatindan edzinon preskaŭ ĉiutage.

Tagoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj pasis, sed li ne boniĝis. Kontraŭe. Kaj fine la malfeliĉa virino mortis kaj estis entombigata.

Beck estis tre feliĉa: nun li povis drinki sen riproĉoj. Kaj li faris tion. Lia vivo estis senĉesa ebrio.

Sed iun tagon li venis el la urbo - kompreneble tre ebria - kaj iris kun ŝanceliĝaj paŝoj hejmen, komence kantante, sed iom post iom kun tristaj pensoj. - Mi ja estis bruto, li murmuris; mia kompatinda edzino, kiu nun dormas en la tero - aĥ, ŝi havis nur ĉagrenojn, kiam ŝi vivis...

Kaj li ploris grandajn brandolarmojn.

- Sed, li diris al si mem, mi volas viziti mian malfeliĉan edzinon. Mi volas konfesi al ŝi, ke mi pentas mian malbonan agadon.

Dirite, farate. Post kelka tempo li staris apud la tombo de sia edzino.

- Kara Tilde, li plorĝemis, mi estas viraĉo ; mi bone scias tion. Kaj vi estis tiom bona kaj amika. Mia pento estas tro malfrua - tro malfrua. Vi estas mortinta kaj ne povas reveni al mi. Aĥ, se vi nur povus ! Mi promesus al vi, ke mi estos tiom bona - ne plu drinkos, ne plu insultos vin; ke mi laboros ĉiutage kaj gajnos multan monon. Sed vi bedaŭrinde ne povas veni al mi, kara Tilde, vi ja estas mortinta kaj dormas en la tero...

Tiam talpteraĵo malrapide kreskis el la tero, kie estis la tombo.

La pentanta viro ekrigardis ĝin kun teruro. Li tremis forte kaj balbutante kriis: - Sed, Tilde, kara edzino - ĉu vi ne komprenas ŝercon?

Kaj li komencis piedpremi la talpteraĵon...

\*\*\*

Ĉiuj ridis. La inspektoro sola restis serioza.

- Jes, li diris, tiaj estas la vivo kaj la homoj - precipe la viroj!

Subite la dika mastrino staris inter ni. Kvankam ŝi estis dika kaj granda, ŝi ĉiam iris tre senbrue. Sammaniere ankaŭ nun. Neniu aŭdis ŝin - subite ni ĉiuj ekvidis ŝin staranta sur la razeno.

- Pardonu min, gesinjoroj, ŝi diris mallaŭte sed tre klare, ĉu iu el vi vidis mian kortserviston John? Mi ne povas trovi lin.

Sinjinorino Makir ekstremis kaj ellasis etan krion, sed poste ŝi sidis tute trankvila, nur iom pala.

Neniu vidis la kortserviston; kaj la mastrino malaperis en la domon.

La gaja atmosfero estis for. La gastoj ektrovis, ke la vespero jam progresis, kaj unu post alia foriris por enlitiĝi. Restis nur sinjinorino Makir kaj la inspektoro - kaj mi mem.

- Sinjinorino, diris la inspektoro mallaŭte, mi tre deziras paroli iomete kun vi. Ĉu vi bonvolus promeni kun mi? Ne, kara Svend, mi devas promeni nur kun la sinjinorino. Vi devas iri en vian liton, sinjoro. Estas malfrue, kaj vi devas havi vian necesan dormon. Alie vi dormas morgaŭ matene tro longe!

Sinjinorino Makir kapjesis, kaj ili iris el la ĝardeno. dum kiam mi restis - tre malkontenta. Mia scivolemo estis granda. Kial mi ne rajtis kuniri? Kion deziras la inspektoro? Kaj kie estas la kortservisto? Ĉu nova murdo?

Mi iris en mian liton, sed longe mi kuŝis maldorma pro miaj pensoj.

## **VIII. Mi fariĝas rompŝtelisto.**

- Nun mi absolute ne plu volas resti ĉi tie! kriis sinjinorino Kink.

- Kio okazis? mi demandis.

Estis la posta tago. Neniu estis en la ĝardeno escepte de la gesinjoroj Kink. La edzo aspektis tre malgaja - sed tio ne estis io nova, ĉar li ĉiam aspektis malgaja.

Sinjinorino Kink staris - granda kaj dika kaj malbela - meze en la ĝardeno. Ŝia vizaĝo estis ruĝa.

- Ĉu vi vere ne scias, kio okazis? ŝi kriis al mi. - John, la kortservisto, estas mortinta - oni murdis ankaŭ lin. La venontan fojon eble mi aŭ vi aŭ mia kara edzo estos viktimo. Estas terure - mi dezirus esti en Ameriko! Mi kredis, ke ĉi tie, en Danlando, ĉio estas tiom trankvila kaj bona - sed ne, ĝi ja estas murdantkaverno...

- Nur estu trankvila, kara sinjinorino, sonis la voĉo de la inspektoro malantaŭ ni. Neniu volas murdi vin, neniu kuraĝas - kaj mi povas certigi al vi, ke la murdinto baldaŭ estos kaptata.

- Ĉu vi vere kredas tion?

- Ne. mi scias certe.

- Ĉu vi konas lin?

- Ankoraŭ ne. Sed kial vi opinias, ke la murdinto estas »li«?

- Ĉu estas virino?

- La tempo malkovros la tutan aferon.
- Sed kie oni murdis John? mi demandis.

La inspektoro turnis sin al mi.

- Venu! li diris. Ni iru promeni!

Ni forlasis la ĝardenon kaj la paron Kink. Sur la vizaĝo de mia amiko mi legis, ke li scias ion interesan, sed dum longa tempo li silentis.

- Virinojn oni neniam povas kompreni, diris mia amiko fine.
- Kion vi opinias?
- Sinjorino Makir havas ŝlosilon de la sekreto, sed ŝi ne volas cedi ĝin. Ŝi mem verŝajne ne murdis Ellen, nek la kortserviston, kaj ŝi povus helpi min, se ŝi volus. Kial ŝi rifuzas...?
- Ĉu sekreto de la koro estas la kaŭzo?
- Verŝajne ne, kara amiko, ĝi estas timo, aŭ ruzo, aŭ eble ambaŭ kune.
- Sed kial ruzo? Kian profiton ŝi havus el tio?
- Se mi nur scius!
- Sed hieraŭ vespere ŝi ja absolute timis.
- Jes, sed ni ne scias, kion aŭ kiun ŝi timis.
- Bonvolu rakonti pri la kortservisto.
- Jes volonte. Li estis murdata en la plantejo proksime al la loko, kie ni du renkontis - aŭ surprizis - nian karan sinjorinon Makir, kaj preskaŭ je la sama tempo. Fakte mi kredas, ke la mistera virino vidis la murdinton, eble la murdon - kaj tial ŝi ekkriis.
- Kiamaniere oni murdis lin?
- Klingo en la koron - senbrua kaj efektiva metodo!
- Kaj la tranĉilo?
- Estas for, kompreneble.
- Neniaj spuroj aŭ piedsignoj?
- Tro multaj.
- Kion vi volas fari?
- Kapti la murdinton.
- Ĉu vi konas lin?

- Tiel demandis sinjorino Kink. Ne, mi ne konas lin, sed mi baldaŭ trovos spuron. Mia bona amiko, ĉu vi iam fariĝis domrabisto?

- Kiom mi memoras - tute ne.

- Sed ĉu vi ne emus fariĝi rompŝtelisto?

- Kaj esti arestata - ne. dankon!

- Sed estas necese. Vi devas helpi min.

- Kiam?

- Ĉi nokte, kiam la homoj dormos aŭ estos for de siaj ĉambroj.

- Sed, mia bona kamarado...

- Nu, kompreneble mi ne volas devigi vin al io, sed ĝi estas la sola eliro.

- Kaj la risko?

- La risko estas malgranda. Vivi signifas riski.

- Vi pravas. Kaj kompreneble mi volonte helpos. Ni devas solvi la malluman misteron. Mi konsentas.

- Tre bone !

\*\*\*

Se mi dirus, ke mi estas trankvila, mi mensogus. Kontraŭe mi estis nervoza la tutan tagon, ŝajnis al mi ke ĉiuj povas vidi miajn pensojn. Kompatindaj homoj, kiuj nutras sin per ŝtelado! Ĝi estas neenviinda laboro!

La inspektoro kondukis, kvazaŭ li havus la plej bonan konsciencon sur la tero. Li paroladis, konversaciis kun la sinjorinoj, ŝercis, fumis, trinkis bieron en la ĝardeno, faris longan promenon brakon sub brako kun sinjorino Makir. Per malmultaj vortoj: oni ne povus imagi, ke li estas rompŝtelonto.

Iĝis vespero. Mi iradis maltrankvile de loko al loko kaj tre ofte konsultis mian brakhorloĝon. La tempo pasis terure malrapide.

Fine la nokto venis. Laŭ ordono de la inspektoro mi restis en mia ĉaro, atendante.

Tute senbrue mia amiko venis en la malluman ĉambron kaj haltis apud mi.

- Nun ŝi estas for, li flustris.

- Ŝi?

- Jes, nia kara sinjorino. Venu - sed silente!

Mi ŝteliris tra la mallumo. Mi nur klopodis sekvi la figuron de la inspektoro. De la ĉambroj aŭdigis ronkado de dormantaj homoj. Cetere ĉio estis kvieta.

- Nu, restu ĉi tie! diris la inspektoro mallaŭte. Antaŭ ni estas la ĉambro de la kara virino Makir. Mi faros



rapidan viziton ĉe la bela sinjorino.

- Sed ŝi povus vekigi?

- Ne, ĉar ŝi ne estas hejme, tion mi ja diris. sinjoro detektivo. Tial vi devas stari ĉi tie por doni al mi signon, se ŝi venos dum mia restado en la junulinĉambro, ĉu vi komprenas? Se vi aŭdos iun bruon, tiam frapu la pordon - sed nur tre malforte!

Li malaperis en la ĉambron. Mi staris streĉe atentante en la dormanta domo. Neniu venis, nenio okazis, ĉio restis kvieta. La tempo - iom longa tempo - pasis. Eble pro la nokto kaj la nekutima situacio ŝajnis al mi, ke la tempo estas pli longa ol ordinare. Sed eĉ la plej longa tempo iam finiĝas.

Fine mi aŭdis la voĉon de mia amiko.

- Ĉu vi dormas ?

- Ne, mi estas plene maldorma.

- Mia laboro estas farita - ni iru!

- Kien?

- En mian ĉambron.

Post unu momento ni ambaŭ sidis en la ĉambro de mia amiko. Li ekbruligis cigaron kaj enpensiĝis, dum kiam mi atente rigardis lin.

- Nu, komencu, Poul! Mi estas ege scivola. Kion vi trovis?

La inspektoro prenis kelkajn leterojn el sia poŝo.

- Ĉi tiujn, li respondis. Kaj nun mi volas vidi, ĉu mia suspekto estas ĝusta. Li legis, dum kiam mi malpacience atendis la rezulton.

- Ĉu ankaŭ mi rajtas legi?

- Atendu iomete! Jes, kompreneble vi rajtas legi la leterojn, sed...

Li aŭskultis streĉe.

- Aŭdu! li flustris. Mia kara amikino venas. Estas plej bone, ke mi kaŝu »corpus delicti« - la kriminalan ŝtelaĵon. Mallumigu la ĉambron kaj ne faru bruon!

Tiel ni sidis dum duona horo, ĝis kiam la inspektoro mallaŭte diris al mi:

- Bonan nokton, kara amiko! Nun vi devas iri en vian liton por dormi kaj sonĝi. Morgaŭ ni eble aŭdos pri strangaj aferoj. Ĝis revido! Sonĝu bele!

## **IX. Sinjorino kun revolvero.**

Kara leganto! Ĉu vi iam klopodis ŝteli? Ĉu vi konas la sentojn de la malfeliĉa ŝtelisto? Ili estas nepre

malagrablaj. Oni legas suspekton en ĉies okuloj. Oni ektemas, kiam iu subite diras ion. Oni sentas, ke la vortoj havas sekretan sencon. La kafo gustas malbone - pli malbone ol pensiona kafo.

Tial mi iĝis gaja kaj dankema, kiam la inspektoro la postan tagon proponis fiŝkaptadon.

- Ni iru al rivero por kapti fiŝojn, mia kara kamarado! Ne malproksime estas bona rivereto kun multaj fiŝoj.

Jen ferio: rivero kun plaŭdantaj ondetoj; neniuj interparoloj; neniuj okuloj. De supre la suno ridetas; la ĉielo estas blua; la arboj verdaj, kaj ie en la akvo estas du boteloj da biero, kiujn ni poste trinkos.

La pensoj povas libere iradi, dum kiam oni sidas sur deklivo apud la rivero, rigardante al la korko sur la akvo.

- Ĉi tio similas studentan ferion, mi ekparolis.

- Jes, la inspektoro murmuris. - Aĉa kanajlaro!

Li prenis la hokfadenon el la akvo kaj grumblis incitita. La lognutraĵo estis for.

- La fiŝoj estis malsataj, mi ridis.

- Sed ne sufiĉe !

La horoj pasis, tre agrable, kvankam ni kaptis nenion. Ni trinkis nian bieron, manĝis buterpanon, kiun ni kunportis, kaj fartis treege bone.

- Sed mi timas, ke la kara Makir ne fartas tro bone hodiaŭ, rimarkigis mia amiko. Ŝi certe konstatis la ŝtelon - ĉu ni vetu?

- Mi ne ŝatas veti, kaj mi ne ŝatas aŭdi pri la ŝtelo. Mi ne taŭgas por esti ŝtelisto.

- Vi tre taŭgas. Vi estas ideala ŝtelisto!

- Vi ankoraŭ ne rakontis pri via malkovro. Kion vi trovis en la ĉambro de la sinjorino?

- Leterojn - vi ja vidis ilin.

- Jes, sed ne la enhavon.

- Nu, ne, sed mi havas la leterojn ĉi tie. Ili estas tre interesaj. Bonvolu.... !

Sed antaŭ ol li donis la leterojn al mi, nia idilio estis interrompata, kaj la inspektoro rapide kaŝis ilin en sian poŝon.

Laŭlonge de la rivero alvenis la persono, pri kiu ni interparolis, sinjorino Makir. Ŝi aspektis bela kaj ĝoja. En la mano ŝi havis sunombreton, kaj ŝiaj ruĝaj lipoj lumis en la klara tago.

- Gardu vin! Ŝi estas danĝera! avertis min la inspektoro, kaj lia voĉo ne ŝercis.

Sed li iris renkonte al la venanto kun gaja saluto.

- Kara sinjorino, li ekkriis, kia honoro! Ni, du solaj viroj, estas tre dankaj al vi!

Kaj baldaŭ ili ŝajne tute forgesis min. Ili interparolis, ŝercis, flirtis - kaj mi sidis sola rigardante al mia hokfadeno.

Nia ekskurso estis detruita, kaj mia ĝojo malaperinta. Kial sinjorino Makir tute ne menciis la ŝtelon? Ĉu ŝi ankoraŭ ne malkovris ĝin?

Ĉu ŝi vere estas danĝera? Eble ŝi estas la murdinto? Ĉu krimulino estas tiom flirtema kaj ŝercema?

Ni kune iris returne al la pensiono. Ni eksidis en la ĝardeno, kaj la inspektoro komencis rakonti anekdotojn. Oni povus pensi, ke ĉio estas bona, ke neniu nokta ŝtelo okazis, ke ni ĉiuj estas nur senkulpaj, maldiligentaj, gajaj ferio-gastoj.

Sed malantaŭ la gajeco estis io - mi ne povas priskribi tion - io minacanta. En la konversacio estis falsaj tonoj, kaj la inspektoro estis singarda, liaj okuloj estis seriozaj malantaŭ la rideto.

Estis kvazaŭ ĉio ajn povus okazi.

Sinjorino Makir rigardis mian amikon ridante kaj diris:

- Ĉu ni faru promenon, sinjoro, nur vi kaj mi? La vetero ja estas ĉarma.

- Efektive, li respondis, la vetero estas ĉarma, kaj la vivo estas bona - sed miaj gamboj estas tro lacaj kaj por fari promenon, mi iris sufiĉe por hodiaŭ. Sed prenu mian amikon, li tre ŝatas promeni kun bela sinjorino. Li amas belajn sinjorinojn; li nur estas tro sinĝena.

Ĉiuj ridis, ankaŭ sinjorino Makir.

- Ĉu vi volas promeni kun mi, sinjoro? ŝi demandis.

- Kun multa plezuro, mi respondis. - Aĥ, trompanto mi estis, kaj eĉ malbona trompanto. Mi tute ne ŝatis promeni kun la bela sireno - sed kiel mi povus eviti tion?

Do - ni promenis. Mia interno estis malkvieta. Ĉu la bela murdinto havas revolveron? Ĉu ŝi pafmortigos min sur iu soleca loko en la plantejo? Mi ne estas kuraĝa homo - kiel la leganto scias; mi ĉiam vivis pace kaj mi neniam faris ion malbonan al miaj kunhomoj.

Longtempe ni promenis silente. Sinjorino Makir fumis cigaredon, kaj nur de tempo al tempo ni interŝanĝis kelkajn vortojn.

Subite mia bela akompananto haltis. Mia koro renversiĝis. Nun estis la kriza tempopunkto.

- Sinjoro...

Ŝia voĉo estis tute kvieta kaj milda.

- Nu?

- Kial vi ŝtelis miajn leterojn?

- Kiujn leterojn?

- Ne klopodu mistifiki min!

- Sed, kara sinjorino, mi certigas al vi per mia honoro: mi ne ŝtelis leterojn.

- Kaj la inspektoro?

- Kial la inspektoro ŝtelus leterojn de vi? Mi tute ne komprenas vin.

- Vidu!

Mi vidis - kaj paliĝis. Proksime al mia brusto estis nigra revolvero en la mano de la bela virino, kies rido malaperis - tute malaperis.

- La inspektoro donis al vi kelkajn leterojn, kiam mi venis laŭlonge de la rivero. Mi mem vidis tion.

- Sed, sinjorino, mi certigas al vi...

- Donu al mi vian jakon!

Nun ŝia voĉo estis malmola kiel ŝtalo. Mi donis al ŝi mian jakon, kaj ŝi esploris ĝin, sed ŝi ja trovis nenion - almenaŭ neniujn leterojn.

- Nu? mi diris. - Vi vidas, ke mi ne havas viajn leterojn?

La situacio ŝajnis al mi treege stranga: dana somervespero, milda, paca, kvieta. Kaj antaŭ mi, malmilda sinjorino kun revolvero.

Mia kuraĝo revenis kaj mi ridetis.

- Kara sinjorino Makir, mi diris, ĉu viaj nervoj ne estas iomete ekscititaj pro la okazintaĵoj de la lastaj tagoj? Mi vere ne estas krimulo, kiu ŝtelas leterojn de belaj sinjorinoj - kaj ankaŭ mia bona amiko estas ĝentilhomo!

Ŝi rigardis min malvarme.

- Dankon, sinjoro, ŝi diris glaciige, bonvolu!

Ŝi redonis al mi la jakon.

- Sed vi sciu, ŝi daŭrigis, ke mi ne kredas vin. Vi mensogas. - Ĉu ni iru hejmen?

Kaj ŝi ekbruligis cigaredon, kvazaŭ nenio estus okazinta.

## **X. Kiu povas kompreni virinojn?**

- Nun vi povas denunci min al la polico, diris sinjorino Makir, kiam ni proksimiĝis al la pensiono.

- Kial mi faru tion?

- Ĉar mi estas krimulo, kompreneble, kiu preskaŭ pafmortigis vin.

- Preskaŭ, jes, ĉar mi ja estas tute viva, sed vi malpravas: mi ne ŝtelis viajn leterojn.

- Vi sciuj, ke mia revolvero ne estas ŝargita - vidu!

Ŝi donis al mi la armilon. Mi rapide esploris ĝin - ne, ĝi ne estis ŝargita.

Surpriza virino! Kaj mi, kiu estis idioto!

- Sed mi tre deziras paroli iomete kun via amiko, la inspektoro.

- Mi alvokos lin, sinjorino.

Mia humoro ne estis plej bona. Mi estis ludinta ridindan rolon, kaj se la inspektoro sciis tion - ne, mi ne komprenas virinojn, precipe ne misterajn virinojn kun revolveroj kaj ruĝaj lipoj. Mi estas feliĉa edzo, mi havas du infanojn, grandajn, ĉarmajn infanojn. Mi havas pacaman edzinon, kiu neniam revas pri pafmortigo kaj krimo.

Sed kie estis la inspektoro, la bestulo, kiu sendis min en la plantejon kune kun furioza sinjorino? Li ne sidis en la ĝardeno. Neniu sciis, kie li estas. Ĉiuj lin ĵus vidis, sed nun li estis for.

Jen venis la mastrino, sinjorino Hansen. Ŝi proksimiĝis al mi kaj donis al mi leteron.

- De via amiko, ŝi diris. Li petis min doni ĝin al vi kun liaj salutoj. Li devis forlasi nin por du-tri tagoj, sed li certe skribis ĉion en la letero.

Mi legis ĝin.

- Kara Svend, la inspektoro skribis, mi devas forvojaĝi, sed post du aŭ tri tagoj mi revenos. Intertempe vi devas vivi trankvile kaj ĝui vian ferion, la freŝan aeron, la kuneston kun la admirinda sinjorino Makir kaj la aliaj virinoj, la aspekton de la maro, la kanton de la birdoj kaj tiel plu. - Ĝis revido!

- Li nur mokas min, mi diris. Li neniam povas esti serioza, la bestulo!

- Mi bedaŭrinde supozas, ke li estas tro serioza, ekĝemis sinjorino Makir. Kaj mi rimarkis, ke ŝi estas tre pala sub la ŝminko.

- Ĉu vi timas ion, sinjorino? mi demandis.

- Jes, sed ne la inspektoron.

- La policon?

- Jes, ankaŭ la policon, sed mi ne estas murdinto. KREDU al mi, ke mi neniam murdis! Kara sinjoro, ĉu mi rajtas iri kun vi en vian ĉambron? Mi estas tre tima, kaj mi devas paroli kun iu. Mi ne kuraĝas esti sola ĉi-vespere.

- En la plantejo vi havis sufiĉan kuraĝon.

- Ne, vi eraras. Efektive mi estis tre tima. Ĉar la leteroj estas tre gravaj. Se la polico ricevas ilin - ne, ne, pardonu min kaj permesu al mi iri kun vi por paroli pri miaj aferoj!

Kompreneble mi jesis, kaj post mallonga tempo ni sidis en mia ĉambro, kie estis du seĝoj.

- Nu, sinjorino! mi komencis. - Bonvolu!

- Mi estas kantistino, ŝi rakontis, - ne tro konata, sed tamen sufiĉe, almenaŭ mi ĉiam havis okupon.

- Kie?

- Ĉie en Eŭropo, ankaŭ ĉi tie en Danlando. Mi amas vian landon, kvankam mi ne estas danino. Mia patrino estis el Danlando, sed ŝi mortis antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis nur malgranda infano.

Lastjare mi gajnis multan monon, kaj mi decidis havi longan ferion. Miaj rimedoj permesis tion, kaj tial mi venis al ĉi tiu pensiono. Mi estis gaja, mi ĝuis la belan naturon, la danan ĉarmon. Nenie sur la tero oni trovas similan idilion. Ĉio spiras pacon, kaj la maro estas la plej ĉarma...

Sed jen, mi renkontis John. Vi ne konis lin, eble vi lin vidis. John estis kortservisto, jes, sed nur ŝajne. Efektive li estis krimulo. Mi konis lin antaŭ pluraj jaroj, kaj mi timis lin. Mi komprenis, ke li havas malbonajn planojn. Li ĉiam havis malbonajn projektojn.

Mi evitis lin, kaj li ŝajnigis sin fremda al mi - en la komenco. Sed jen fraŭlino Ellen estis murdita. Vi povas imagi vin en mia loko. Ĉu mi devus rakonti al la polico pri John? Ĉu estis John, kiu murdis la fraŭlinon? Mi ne scias, kion fari. Kaj tiam John skribis al mi kaj minacis min.

- Kaj kiam vi renkontis John en la plantejo...?

- Ne. ne, ne estas vere, ne, mi ne murdis John. Sed vi pravas: mi renkontis lin en la plantejo. Tio tamen okazis hazarde. Mi faris longan promenon - kaj subite mi staris antaŭ John. Li minacis min denove, kaj mi promesis silenti pri lia estinteco.

- Sed kial vi ekkriis?

- Mi ne povas diri - jes, mi aŭdis ion aŭ iun, kaj mi kredis.... mi timis, ke John murdos min. Ĉu vi kredas, ke la inspektoro iros al la polico kun miaj leteroj? Ĉu li laboras kune kun la polico? Ĉu li estas detektivo?

- Ne, iam li estis detektivo, sed nun li estas tute privata homo. Mi ne scias, ĉu li donos ajn leterojn al la polico - se li havas ilin.

- Ni ludu honestan ludon! Li havas miajn leterojn, kaj vi bone scias tion. Mi estas senkulpa, sed se la polico vidos miajn leterojn, ĝi sendube arestos min. Mi ne ŝatas esti arestata. Mi ne havas tempon, nek emon. Mi estas sola kaj malfeliĉa, kaj vi devas helpi min.

- Kiel?

- Vi devas persvadi la inspektoron, ke li redonu al mi la leterojn. Promesu tion al mi!

- Hm! Unue vi volas pafmortigi min, poste mi devas helpi vin! Vi estas eksterordinara sinjorino, sed mi promesas tion. Mi volas klopodi.

- Dankon, sinjoro! Vi estas nobla homo. Sed nun mi deziras al bonan nokton - kaj denove: koran dankon pro via helpo!

\*\*\*

La nokta rendezuo estis finita. Mi iris en la liton, sed la dormo ne volis veni. Dum kelkaj horoj mi restis maldorma. Miaj pensoj disflugis malorde.

Kie estas la inspektoro. kaj kial li foriris? Kio estas en la leteroj? Ĉu la bela sinjorino diris la veron? Kiu estas la murdinto? Ĉu la sama homo murdis Ellen kaj John - kaj kial li faris tion? Ĉu sinjorino Makir

sekretigas ion?

## **XI. Surprizatako, leteroj, novaj punktoj en la murdafero.**

La malfeliĉaj gepatroj de Ellen kompreneble jam antaŭ longe forlasis la pensionon. Ili havis sian hejmon en Kopenhago, kaj tie Ellen estis entombigata. Ni, la pensionanoj, sendis al la enterigo florojn kaj florkronojn.

Pli ol ok tagoj pasis, de kiam mi venis al la pensiono por serĉi ripozon kaj pacon, kaj dufoje la polico jam vizitis nian domon por juĝesploro. Unu persono estis arestata - kaj kion alportos la estonteco?

La postaj tagoj pasis preskaŭ kviete. La atmosfero kompreneble estis iom malgaja; la pensionanoj ne interparolis multe, sed la junaj homoj iris al la marbordo por bani sin, faris promenojn en la plantejoj, dancis, ridis, flirtis.

Sed estis stranga malkvieto kaj ekscitiĝo en la aero.

Sinjinorino Makir preskaŭ ne vidiĝis, la inspektoro restis for, kaj mi vagadis sen celo. Vespere mi ne kuraĝis iri en la plantejo. Mi restis en la ĝardeno, sed ĝi ne estis interesa. Estis tie tro multaj mezaĝaj matronoj kun siaj infanoj, pri kiuj ili ĉiam parolis, kaj pri kies virtoj ili laŭte fanfaronis.

Unu posttagmezon mi malrapide promenis laŭlonge de la maro. Mi fumis cigaron kaj pripensis la murdaferon. Estis suna, bona tago, kaj mi per ĉiuj sentumoj ĝuis la naturon.

- La inspektoro pravas, mi pensis. Ĉiuj homoj devus esti pacamaj. Kial ili batalas kaj murdas? La tero ja estus bela, la vivo ĉarma, se ni homoj nur volus esti humanaj.

En la sama momento mi aŭdis teruran krion el la plantejo. Mia unua penso estis kompreneble, ke plia murdo okazis.

Mi kuras en la plantejon, kaj mi vidas du personojn, kiuj alkuras al mi. Nun mi ekkonas ilin. Ili estas sinjinorino Kink, la amerikanino, kaj alia gasto el la pensiono, mezaĝa fraŭlo, kies profesion mi ne konas. Lia nomo estas la ordinara dana Jensen.

- Kio estas? mi ekkrias.

Ili haltas en kelka distanco kaj staras silente, dirante nenion, sed ilia vizaĝo parolas pri granda timo.

Mi iras al ili per rapidaj paŝoj.

- Ĉu mi povas ke helpi vin? Kio estas? Ĉu vi vidis murdiston? Ĉu iu minacis vin?

La sinjinorino tute ne povas paroli. Ŝi prenas la manon de la fraŭlo: ŝia vizaĝo estas ruĝa kaj baniĝas en ŝvito.

- Kara sinjoro, fine diras sinjoro Jensen, ni dankas vin kore! Mi havis teruran travivaĵon. Mi sidis sur benko en la plantejo. kiam subite iu batis nin de malantaŭe. Mi ne havis tempon por ĉirkaŭrigardi, sed kuris kiel eble plej rapide for de la benko. Mi timas, ke la krimulo persekutas nin, eble li havas revolveron aŭ tranĉilon. Estas terure ĉi tie. Morgaŭ mi forvojaĝos, nepre! Mi ŝatas mian vivon, kaj ĉi tie oni ja riskas...

La frazo ne finiĝis, ĉar sammomente iu preterkuris min rapidege, kaj sinjoro Jensen eligis kriaĉon, dum kiam lia korpo flugis tra la aero kaj malaperis en la arbetaron. Sinjinorino Kink kriis laŭtege, kaj mi staris, kvazaŭ mi estus falinta el la ĉielo.

Sed subite mi ekridis, ekridegis. Mia tuta timo estis for.

Antaŭ ni staris - ne krimulo, sed granda kolera virkapro, ŝajne kun la intenco ataki la malfeliĉan sinjorinon Kink. Sed la atako forrestis. Eble la virkapro rigardante al la virino trovis, ke ŝi ne estas inda celo, aŭ eble la kuraĝo forlasis la beston pro la aspekto de la forta amerikanino - kiel ajn, la virkapro subite turnis al ni la voston kaj forkuris en la densan plantejon.

La malgaja Jensen rampis el la arbetaro. Li lamentis kompatinde, kaj la dika sinjorino konsolis lin per amikaj vortoj.

- Mia kara amiko, ŝi diris al li karese, kiel vi fartas? Ĉu vi sentas grandan doloron?

Mi ne sentis doloron, sed mi sentis min plene superflua, kaj tial mi adiaŭis ilin por iri hejmen.

- Amo, mi pensis, estas stranga floro. Kiu revus, ke eĉ sinjorino Kink.... nu, komuna ŝippereo estas tre dolĉa!

\*\*\*

La inspektoro estis reveninta, kiam mi venis al la pensiono. Li sidis kiel kutime en la ĝardeno, fumis grandan, nigran cigaron, kaj sur la apuda tablo staris glaso da biero.

- Bonvenon, kara Svend! li salutis min. - Ĉu vi spertis novajn krimojn dum mia foresto?

Lia humoro estis bonega, radianta.

Mi eksidis apud lia tablo kaj demandis mallaŭte:

- Ĉu vi solvis la misteron?

- Nur parte, ankoraŭ mankas al mi la ĉefpersono, sed mi trovis interesajn faktojn. Poste mi rakontos al vi.

Kaj li rakontis, iom poste, ke dum sia foresto li esploris la konataron de Ellen.

- Mi ne povas trovi, li diris, la rilaton inter la du murdoj. Ellen tute ne konis John. Cetere, neniu lin konis.

- Ĉu ankaŭ ne sinjorino Makir?

- Vi pravas, ŝi estas escepto. Sed legu ĉi tiujn leterojn!

Li donis al mi du leterojn, kaj mi legis ilin.

La unua enhavis la sekvantajn vortojn:

»Estimata

sinjoro

Groner!

*Responde al via letero mi povas informi vin, ke kune kun mia amikino Ellen Nordh restadis ĉi tie dum la monato Marto: la artpentristo Henrik Ling kun sia edzino, la grandbienulo Emil Magle kun sia edzino kaj fine leŭtenanto Kai Breme kun sia edzino. Sinjorino Breme interrompis la restadon kaj iris hejmen, ĉar ŝia filino malsaniĝis. Ellen kaj sinjoro Breme estis bonaj amikoj - sed per tio mi ne volas aludi malbonan.*

Via respekta



Inga Regger. «

- Mi ne komprenas, mi ekparolis.

- Ne, sed legu la alian leteron!  
Mi faris tion.

»Sinjoro!

*Mi tute ne komprenas vian leteron. Mi bone konis la malfeliĉan Ellen, sed kial mi estus vizitinta ŝin en »Marbordo«? Post Marto mi ne vidis ŝin, kaj mi bedaŭras, ke mi ne povas sciigi ion por informi vin. La murdo de nia amikino estas malgajiga afero, kaj mi tre volonte helpus vin, se mi nur kapablus.*

*Via respekta*

Kaj Breme. «

- Ĉu ankaŭ ĉi tiun leteron vi ne komprenas? demandis la inspektoro.

- Li almenaŭ scias nenion.

- Ĉu ne? Laŭ mia opinio li kontraŭe scias multe, sed baldaŭ vi mem povos aŭdi.

- Vi opinias?

- Mi opinias, ke la nescianta leŭtenanto venos al ĉi tiu loko post unu horo.

- Sed kiel...?

- Mi minacis lin. Mi skribis al li, ke mi konas la tutan veron, ke lia situacio estas tre danĝera, se li ne volas rakonti pri sia renkonto kun Ellen. Mi persiste asertis, ke li nepre sekretigas ion, kaj la rezulton ni vidis hodiaŭ. Se li estas senkulpa kaj sincera, li ne venos, sed se li kaŝas aferojn - kion mi absolute kredas - ni baldaŭ ekvidos lin proksime al la pratombo, kie ni trovis la mortintan Ellen. Ni vidu! Venu, kara amiko, ni volas promeni en la bela vetero - eble ni baldaŭ havos la solvon de la enigmo.

La vojo estis preskaŭ senhoma malgraŭ la bela vetero. Ĉiuj homoj ankoraŭ estis sur la strando. Ni iradis malrapide laŭ la vojo.

- Mi nun havas unu deziron, diris Poul, nome, ke sinjorino Makir restu for. Mi ne deziras renkonti ŝin ĉi tie...

Mi rakontis pri miaj spertoj kun la mistera artistino, kaj mia amiko ridis. Li ridegis, kiam mi rakontis pri sinjorino Kink kaj la malfeliĉa Jensen.

- Vi ja vere spertis sufiĉajn aventurojn por via tuta estonto, Svend. - Hm! la bela virino havas revolveron kaj iĝis nervoza! Jes, kial ne? La afero maturiĝas. Se mi nur scius, ĉu estas *du* aferoj aŭ nur *unu*, sed la tempo montros tion.

Post longa promeno ni proksimiĝis al la tombaltaĵo. Ĉi tie la plantaĵo estis alta kaj malnova. Grandaj pinoj ombris la ĉirkaŭan lokon. Strange malagrabra atmosfero regis ĉi tie. Eĉ ne kantis birdoj.

- Nu, kara amiko, eksidu sur la herbon! Mi devas ĝisatendi la pason de la okazaĵoj.

Nia atendo ne daŭris longe. Subite mi ekvidis elegantan bluan aŭtomobilon, kiu haltis apud ni, kaj iom nervoza voĉo demandis:

- Ĉu unu el vi estas inspektoro Groner?

Mia amiko tuj ekstaris kaj salutis la aŭtomobiliston.

- Mi dankas vin, sinjoro leŭtenanto! li kore diris. Kaj mi petas vin pardoni, ke mi tiel ĝenas vin - sed estas nepre necese.

La leŭtenanto - kiu ne estis vestita per uniformo - venis al ni kaj salutis nin ne tro kore.

Li ekparolis rapide kaj nervoze:

- Jes, kiel malnova amiko de Ellen mi kompreneble volas fari ĉion por trovi la banditon, kiu murdis ŝin, sed estas tre malagrabla por mi - mia edzino - miaj infanoj...

- Verŝajne ankaŭ por Ellen estis iomete malagrabla, ĉu ne? diris Groner malvarme.

- Sed ni iru al la tombaltaĵo. Tie ni povos resti neĝenata.

Ni eksidis apud la pratempa tombaltaĵo, kaj la inspektoro turnis sin la leŭtenanto.

- Mi deziras scii, ĉu vi ambaŭ renkontiĝis ĉi tie la fatalan tagon, kiam Ellen Nordh estis murdata.

- Kiel ni scias...? komencis la leŭtenanto.

- Ne gravas, sed mi scias - tio sufiĉas. Rakontu, sinjoro Breme, mi petas al vi. Kompreneble, mi neniel volas ĉagreni vin, sed mi intencas trovi la murdiston, kaj vi devas helpi min.

- Ni renkontiĝis ĉi tie, konfesis sinjoro Breme. Mi skribis al Ellen...

- Mi scias, interrompis la inspektoro, mi legis vian leteron.

Sinjoro Breme ruĝiĝis iomete. Post paŭzo li daŭrigis:

- Ŝi promesis renkontiĝi kun mi ĉi tie. Dum kelkaj jaroj mi konas la lokon kun la tombaltaĵo, ĉar mia edzino kaj mi antaŭ longe pasigis ĉi tie nian ferion. Nu, mi venis, kaj ni interparolis ĉirkaŭ unu horon, kaj poste mi veturis hejmen.

- Ĉu tio estas ĉiom?

- Jes, mi ne memoras pli multe.

- Ĉu vi kverelis?

- Iomete. Mi - nu, mi amis Ellen, sed ŝi - ŝi interrompis nian interrilaton.

- Ĉu tial vi murdis ŝin?

La leŭtenanto eksaltis de la herbo.

- Ne, mi juras, ke mi ne murdis Ellen! li ekkriis. Vi nepre kredu min!
- Sed kial vi ne sciigis al la polico, ke sinjoro Hansen estas senkulpa?
- Tion mi ja ne certe scias.
- Li forlasis Ellen, antaŭ ol ŝi renkontiĝis kun vi. Vi certe vidis lin.
- Jes, sed mi ne scias, ĉu li revenis poste.
- Hm! sed vi scias, ke li venis kune kun Ellen kaj forlasis ŝin antaŭ via rendevuo.
- Jes.
- Ĉu vi vidis aliajn personojn?
- Ne - jes, sed - jes, mi vidis sinjorinon, kiam mi estis survoje hejmen post mia interparolo kun Ellen.
- Kia ŝi aspektis? Ĉu vi povas rekoni ŝin?
- Jes, mi kredas, ke mi povas, sed tio ja ne estas certa. Mi konstatis, ke ŝia robo similas la robon, kiun Ellen portis.
- Ĉu ŝi iris en direkto al ĉi tiu loko aŭ for de la tombaltaĵo?
- En direkto al la tombaltaĵo.
- Hm! bone! Kaj nun mi petas vin, sinjoro, iri kun ni al nia pensiono.

La leŭtenanto paliĝis.

- Ĉu vi volas aresti min? li balbutis.
- Kara leŭtenanto, ridis Groner, ne timu! Mi absolute ne volas aresti vin! Vi devas fidi al tio. Kaj cetere: kiel soldato vi devas esti iomete kuraĝa!

Lia voĉo estis tre ironia.

- Jes, mi scias, respondis Breme, sed mia malfeliĉa edzino, miaj malfeliĉaj infanoj...!
- Antaŭe vi iom facile forgesis ilin, mia kara sinjoro! Ĉu ne estas iom malfrue ĉagreniĝi pro la familio? Nu, venu, mia brava leŭtenanto!

Post alveno al la pensiono la inspektoro mendis tri glasojn da biero, kaj ni eksidis en la ĝardeno.

- Mi petas vin, sinjoro, flustris Groner, observi ekzakte la gastojn, kaj se vi rekonos la sinjorinon, kiun vi vidis la menciitan tagon, tiam diru tion al mi. Estas ege grave.

La pensionanoj venis kaj iris. Multaj estis ĉe la maro, sed kelkaj preferis la ombron de la ĝardeno ol la strandon.

Nun sinjorino Makir iris preter ni. Ŝi ridetis al Groner, kaj li salutis ŝin.

- Jen ŝi estas, flustris sinjoro Breme. Mi rekonas ŝin. Estas nenia dubo.

- Tre bone, sinjoro! Nu - ni eltrinku la glasojn. Je via sano! Mi dankas vin, sinjoro Breme! Kaj nun vi povas reiri hejmen. Se estos necese paroli kun vi, mi ja havas vian adreson. Sed ne timu! Ĝis revido!

La leŭtenanto forlasis nin - aspektante tre malgaja.

- Senkuraĝulo! murmuris Groner. Tia ulo *povus* fariĝi murdisto, eble li jam fariĝis!

## **XII. Grava interparolo.**

- Ĉu ni ne devas raporti al la polico pri ĉi tio? mi demandis.

- Ni devas, jes, sed mi volas prokrasti la aferon iomete. La brava leŭtenanto ja pravas: li havas familion. La polico ordinare ne estas tro konsiderema. Miaparte mi ne ŝatas policon...

- Sed vi ja mem...

- Jes, ĝuste tial. Nu, la polico havas multajn malfacilaĵojn kaj devas labori konforme al niaj leĝoj kaj statutoj. Mi estas privata homo kaj rajtas labori laŭ mia koro. Kaj fine mi ne estas konvinkita pri tio, ke Breme estas kulpa. Mi konfesas, ke tio estas nur sento - sed mi ja scias, kie li estas. Li ne povas fuĝi. Unue mi volas fari esploron pri la ĉarma sinjorino. Tie ŝi estas, kaj mi volas iomete paroli kun ŝi.

- Ĉu mi rajtas resti ĉi tie?

- Jes, mi ne havas sekretojn al vi, kara Svend. Almenaŭ ne nun. - Bonan tagon, sinjorino, ĉu vi havas tempon por eta rendezuo?

Sinjorino Makir venis malrapide al nia tablo.

- Eksidu, kara sinjorino! Ĉu vi deziras glason da biero? Svend, bonvolu mendi tri glasojn!

Mi faris tion, kaj la inspektoro daŭrigis:

- Sinjorino Makir, ĉu vi povas diveni, kiu murdis Ellen?

Ŝi paligis iomete.

- Ne, ŝi diris, ĉu vi scias?

- Mi ne scias, sed mi suspektas. Vi ja promenis proksime al la tombaltaĵo la koncernan tagon, ĉu ne?

- Kiu diris tion?

- Tio ne gravas, sed ĉu ne estas vere?

- Se vi volas aludi, ke mi murdis Ellen. vi absolute malpravas.

- Kiu aludas tion? Ne, sed ĉu vi ne vidis iun ajn?

- Neniun - escepte Ellen.

Ĉi tion dirinte sinjorino Makir iĝis tre pala, kaj ŝiaj manoj tremis.

- Ho, ho! Vi do vidis Ellen? Kial vi ne diris tion al la polico?

- Mi - mi - ne ŝatas esti arestata.

- Ellen estis mortinta?

- Jes, ŝi estis mortinta verŝajne. Sed mi - mi ektimis kaj forkuris rapide.

- Estas iom mistere, kara sinjorino. Vi ja ankaŭ estis proksima, kiam John estis murdata.

- Jes, sed mi ne murdis Ellen, nek John, ŝi kriis, - kaj vi bone scias tion!

- Ne, mi ne scias, sed mi kredas, ke vi estas senkulpa.

- Kial?

- Ĉar vi timas ion, mi ne scias kion. Kara sinjorino, kial ne konfesi al mi, kion aŭ kiun vi timas?

- Mi timas nur la policon. Mi estas eksterlandano, kaj mi havas mian laboron. Se la polico arestus min, mia kariero rompiĝus. Mi estas malriĉa. Mi devas gajni monon por vivi - aĥ, kara inspektoro, donu al mi la leterojn!

- La leterojn de via edzo?

- Jes... ne, ne, John ne estis mia edzo.

- Li *estis!* Ne neu tiun fakton!

- Kiel vi eksciis tion?

- Ne gravas! Sed viaj leteroj...

- Ĉu vi jam donis ilin al la polico?

- Ne, sed mi ne havas ilin ĉi tie. Via edzo skribis pri plano - kiu plano? Ĉu vi bonvolus informi min pri tio?

- Mi ne konas iun planon.

- Nun vi mensogas, kara sinjorino. Vi devas diri la veron, alie mi ne povas helpi vin.

- Mi ne povas diri ion ajn.

- Ĉu vi amis vian edzon?

- Jes, kompreneble.

- Kial »kompreneble«? Multaj sinjorinoj tute ne amas sian edzon. Mi ne estas konvinkita pri tio, ke vi amis lin tro multe.

- Vi opinias, ke mi murdis lin?

- Ne, tute ne! Vi havas revolveron, sed mi ne kredas, ke vi havas ponardon. John estis murdata per speciala ponardo, kiel vi scias. Sed vi scias ankaŭ, kiu murdis vian edzon. Kaj laŭ mia opinio la sama persono murdis Ellen, kiu ankaŭ estis murdata per ponardo. Mi scias cetere, ke ĝi estas la sama persono - kaj la polico scias - ĉar estas la sama ponardo, kiu estas uzita. Vi povas helpi min. Kial vi ne volas? Aŭ ĉu mi devas iri al la polico?

Paŭzo. Sinjorino Makir meditis iomete kaj profunde.

Tiam ŝi diris:

- Sinjoro Groner. postmorgaŭ mi diros ĉion.

- Tro malfrue!

- Sed - sed - morgaŭ posttagmeze?

- Kial prokrasti la aferon? Kial ne diri ĉion nun kaj ĉi tie ?

- Ĉar mi ja ne scias ion. Mi nur - mi nur havas suspekton. Vi nepre kredu min, kiam mi diras, ke mi ne vidis la murdon de mia - de John. Mi nur aŭdis bruon kaj ektimis. Kaj koncerne Ellen, mi nek vidis, nek aŭdis ion ajn. Mi trovis ŝin sur la tero apud la tombaltaĵo. Ŝi estis mortinta - jen ĉio. Mi diras la veron.

- Jes, mi kredas vin, sed vi kaŝas ion. Nu, bone - mi volas atendi ĝis morgaŭ, sed vi devas resti ĉi tie - mi atentis vin.

- Dankon, sinjoro !

\*\*\*

Ni restis silente sidantaj. La inspektoro mendis plian glason da biero kaj fumis cigaron, dum kiam li meditis pri la afero. Mi kiel kutime komprenis nenion!

- Kiel vi eksciis, ke John estis la edzo de sinjorino Makir? mi demandis.

- Per la leteroj kaj - simpla divenado.

- Sed la plano?

- Jes, li skribis pri plano, kiu devus enspezigi multan monon. Sed la leteroj enhavas neniun nomon. John aplikas la esprimon »nia malnova amiko«, sed kiu estas la malnova amiko? Nu, kara Svend, ĉu mi estas idioto? Eble mi tuj devus informi la policon, sed mi neniam povas rezisti ĉarman virinon.

- Nun ni havas du murdojn, mi diris.

- Jes, kaj neniun murdinton. La polico tenas la malfeliĉan Hansen, kiu estas senkulpa.

- Vi ne povas pruvi lian senkulpecon?

- Ankoraŭ ne, sed morgaŭ posttagmeze, sinjoro.

- Sed se sinjorino Makir estas kulpa...

- Tiam estas tre malĝuste ne aresti ŝin - ho jes, kaj ŝi ne estas senkulpa. Ŝi mem estas krimulo, eĉ se ŝi ne

murdis la du personojn. Mi dezirus scii, kion ŝi intencas fari!

### **XIII. Apud la tombaltaĵo. - Mi kaptas la murdiston.**

Fariĝas vespero, rava vespero. Ĉe la vespermanĝo la inspektoro estis tute en sia elemento, oni ne povus pensi, ke li estas okupita pri murdaferoj.

La spirita atmosfero estis serena kaj la humoro senzorge gaja. La sinjorino Makir ridetis kaj babilis. kvazaŭ ŝi estus trankvila kaj senkulpa.

Post la manĝo ni kiel kutime trinkis kafon en la ĝardeno, kaj la sinjorinoj postulis insiste, ke la inspektoro rakontu anekdotojn.

Groner ekbruligis cigaron.

- Jes, plezure, li diris, sed vi jam konas miajn anekdotojn.

- Ne ĉiujn, kriis la virinoj. - Rakontu!

- Eble vi ne konas la anekdoton pri la danĝera komplimento?

- Tute ne, sonis la respondo.

- Do, gesinjoroj! Komplimentoj estas la salo de la vivo, kiel vi ĉiuj ja scias. Kaj vi, sinjoroj, espereble tre ofte diras komplimentojn al viaj ĉarmaj edzinoj. - Sed tro multe da salo estas malbona, kaj la salo ĉiam estu freŝa!

En hospitalo estis iam edzo. Li kuŝis en blanka lito, kaj ĉirkaŭ la kapo li havis multajn bandaĝojn. Amiko venis por viziti lin. Li staris apud la lito, kaj vidante la multajn bandaĝojn, li diris:

- Kara amiko, mi vidas, ke vi estas tre malsana. Sed mi ne scias, kiel vi malsaniĝis. Ĉu vi havis aŭtomobilakcidenton?

- Ne, kara amiko, murmuris la paciento. Estas tre malĝojiga afero. Mi diris komplimenton al mia edzino.

- Ĉu vi ŝercas? demandis la amiko. Vi ja ne povas opinii, ke...

- Jes, estas la vero. Ni sidis - mia edzino kaj mi - en nia salono, kaj ambaŭ legis gazeton. Tiam mia edzino, kiun mi tre amas, subite demandis:

- Ĉu vi vere amas min?

- Kara edzino, mi respondis, kompreneble mi amas vin, tion vi ja scias.

- Jes, nuntempe. Sed ĉu vi ankaŭ amas min, kiam mi iĝos maljuna kaj malbela?

Kaj tiam mi, idioto, respondis:

- Kara Anna, vi povos iĝi pli maljuna. sed vi absolute ne povos iĝi pli malbela... Jes, kaj jen la rezulto!

Kiam la tuta rondo ridis pri la malfeliĉa edzo, mi senbrue forlasis la ĝardenon por fari promenon en la

silenta vespero.

La vetero estis idilia, la suno malleviĝis ĉe la horizonto, kaj ĉio elspiris pacon.

Se mi tiam sciis, kion mi la saman vesperon travivos, mi tute ne ĝuus la naturon kaj la silenton!

Sed mi ne sciis. Mi iris tra la plantejo al la pratempa tombaltaĵo, nenion suspektante.

Mi estis tute sola apud la tombaltaĵo. De malproksime mi aŭdis ridon kaj voĉojn, sed la loko, kie Ellen estis murdata, estis silenta, senbrua, sola, iom malgajiga - kaj tamen la loko estis tre bela. Mi amas niajn antikvajn monumentojn, kvankam mi ne estas arkeologo.

Miaj pensoj venis kaj malaperis:

- La vespero estas ankoraŭ hela, sed baldaŭ la suno malaperos, kaj la somernokto venos kun sia poezio, sed eble ankaŭ kun malbonaj pensoj kaj agoj. Ie maldormas malsanulo, aliloke ĝemas malsatanto; homoj amas; homoj malamas; la terglobo turniĝas en la universo - kial, kien?

Subite mi vekigis el miaj pensoj pro duonsufokita krio - nur unu krio kaj nur mallaŭta.

La krio venis de trans la tombaltaĵo, kaj mi sidis sur la herbo ĉirkaŭ kvindek metrojn malproksime.

Mia unua impulso estis forkuri. Kiel mi jam diris, mi estas malkuraĝa, sed mi hontigis min mem. - Eble iu estas en danĝero kaj bezonas vian helpon! mi diris al mi. - Vi devas helpi!

Sed miaj gamboj tremis, kaj nur pene mi povis iri al la loko, de kie mi aŭdis la krimon. Terura vidaĵo min renkontis: sur la herbo kuŝis sinjorino Makir. Ŝi estis mortinta, kaj sur la herbo abundis ŝia sango.

En la mano ŝi havis revolveron - sed kial ŝi ne estis uzinta ĝin? Mi ne estis aŭdinta pafon. Kaj kie estas la murdinto? Eble proksime. Mia situacio estas eble tre danĝera - eble la murdinto kaŝas sin ie malantaŭ la pinoj.

Kion fari? Mi devis havigi al mi helpon, sed kiel? Tiam mi ekmemoris la telefondraton - jes, kompreneble, la kripla sinjoro Bang ja havas telefonon. Ĉe li mi povos telefoni al inspektoro Groner kaj al la polico...

Mi forlasis la malgajigan lokon, sekvante la direkton de la drato. Mi facile povis vidi ĝin, kaj mi iris kiel eble plej rapide.

Survoje mi vidis neniun; la plantejo estis tute senhoma kaj senbrua. Sed kiam mi proksimiĝis al la vilao de sinjoro Bang, mi ekvidis personon, kiu malrapide venis al mi. jes, mi skribis »venis«, sed la korekta esprimo estas »veturis«, ĉar la persono iris per rulseĝo. Mi tuj komprenis, ke li estas sinjoro Bang, kvankam mi neniam vidis lin antaŭe.

Nun li ekvidis min kaj salutis ĝentile.

- Bonan vesperon! mi rapide diris. Vi estas sinjoro Bang, ĉu ne? Mia nomo estas Beck, kaj mi telefonis antaŭ kelkaj tagoj de via domo al la polico, kion vi eble memoras. Mi pensas, ke via mastrumistino rakontis pri la afero. Nu, mi devas pruntepreni vian telefonon ankoraŭ unu fojon. ĉar terura murdo denove okazis...

- Terura murdo! balbutis sinjoro Bang. Sed - ĉu estas - estas - ĉi tie - kie?

- Apud la pratempa tombaltaĵo - la sama loko, kie oni murdis la junan fraŭlinon Ellen Nordh.



- Rapidu, sinjoro Beck! kriis nun la invalido. Rapidu! Kompreneble vi rajtas uzi mian telefonon.

Li turnis la rulseĝon kaj irigis ĝin en direkto al la domo.

Sinjoro Bang aspektis tre nervoza. Mi memoris, ke lia mastrumistino menciis lin kiel homeviteman. Cetere li estis forta viro kun grandaj manoj. Liaj haroj estis grizaj, sed li tute ne faris impreson de maljuna viro. Kontraŭe, liaj movoj estis viglaj, kaj lia vizaĝo estis sana kaj sunbrunigita.

- Kiom longe vi loĝas ĉi tie en la plantejo? mi demandis.

- Nu, dum multaj jaroj, li respondis. Mi amas la lokon. Dumvintre ĝi estas ĉarma idilio.

Mi komprenis lin: dumvintre ĉiuj somergastoj estas for, kaj li havas la tutan plantejon por si mem. Sed mi diris nenion. Subite mi paliĝis, kaj mia koro ekbatis fortege.

*Nun mi sciis, kiu estas la murdinto!*

La malkovro venis al mi kiel fulmo el hela ĉielo, kaj mi tute ne sciis kion fari.

Ni proksimiĝis al la domo de sinjoro Bang. Kelkfoje mi helpis lin, kiam la vojo estis tiom malbona, ke la rulseĝo ekhaltis pro la malebena tereno aŭ pro ŝtonoj, kaj ĉiufoje li dankis min amike.

- Bedaŭrinde, li diris, mi estas nur invalido, sed eĉ invalido povas ĝui la belan veteron. Mia bona mastrumistino, fraŭlino Holt, helpas min tute malegoisme. Mi ne povus malhavi ŝin. Mi esperas, ke ŝi estas hejme nuntempe, ŝi ankoraŭ ne atendas mian revenon.

- Sed via hundo estas hejme!

- Jes, kompreneble. Ĝi gardas la domon. Ĉu vi ne ŝatas mian hundon ?

- Nu, ĝi estas fakte tre atentema, kaj mi timas ĝin. Mi ne estas sufiĉe kuraĝa.

Sinjoro Bang ridis.

- Nenio malbona okazos, kiam mi ĉeestos, li diris. »Urso« estas hundo inteligenta kaj fidela.

Mia cerbo laboris. Mi konis la murdinton, sed kiel kapti lin? La inspektoro troviĝas en la pensiono, kie li plej verŝajne sidas en la ĝardeno, rakontante gajajn anekdotojn al la sinjorinoj. Li ne scias, kie mi estas. Kaj la polico estas malproksime. Mi estas tute sola; mi ne havas armilon; mi havas nenion - nenion...

»Urso« bojis. Mi estis ĉe la domo. Denove mi helpis sinjoron Bang. Estis iom malfacile puŝi rulseĝon en la ĝardenon, sed mi sukcesis post kelka peno. Bang irigis sian veturilon al la domo. Mi sekvis pli malrapide, rigardante al la hundo, kiu evidente ne amis min, sed deziregis min mordi.

- Fraŭlino Holt! ekkriis Bang. Ĉu vi estas hejme? Bonvolu helpi min!

Neniu respondis. Fraŭlino Holt ne estis hejme - granda ŝtono falis de mia koro.

- Permesu al mi helpi vin eniri la ĉambron, sinjoro! mi diris. La fraŭlino certe baldaŭ venos.

Li kapjesis, kaj mi alproksimiĝis.

En mia kapo zumis kiel abeloj mil pensoj kaj ideoj. - Oni diras, ke dronanto vidas sian tutan vivadon en la

daŭro de momento. Same miaj pensoj disflugis. Mi vidis mian edzinon kaj miajn infanojn. Mi estis farinta tro malmulte por ĝojigi ilin. Tro ofte mi estis egoista. - Mi ankaŭ vidis la inspektoron. Li opinias esti tiom ruzosperta, mi pensis, sed nun li povas klopodi eltrovi la misteran aferon, se li emas - li tamen malsukcesos. Mi havas la ŝlosilon, kaj mi kunportos ĝin - en la morton.

Jes, antaŭ mi estas la morto. Mi havas ferion kune kun la morto. Ĝi estas malagrabla kamarado!

Sed ĉu ne kaŭzas tion nur via fantazio? mi diris al mi. Eble li tute ne suspektas vin?

La argumentoj estis absolute senutilaj. La vero loĝis en mia koro, kaj la vero parolis: - Post kelkaj minutoj vi estos mortinta, se vi ne trovos ian miraklan solvon. Kiel kutime vi estis malinteligenta, kiam vi akompanis sinjoron Bang al ĉi tiu loko. Vi devus forkuri tuj kiam vi eltrovis la veron, sed mankas al vi kuraĝo kaj aginstinkto.

Mi serĉrigardis pri eliro - kaj subite eta lumo ekbrulis en mia animo. Jes, vere - ekzistas eliro, kvankam ĝi estas necerta. Ĉirkaŭ tri metrojn fore mi ekvidis - malfermitan garaĝopordon, kaj ĝis la pordo estis kahela vojeto.

Ĉu mi skribis, ke mi ne havas aginstinkton? Mi ĝin tamen havas, kara leganto, almenaŭ havis en ĉi tiu momento. Mi turnis la rulseĝon, ŝovis ĝin al la garaĝo, en la garaĝon, fermis la pordon, kaj turnis la ŝlosilon. Mi klinis min kaj prenis de sur la tero ŝtonon, kiun mi ĵetis al la furioza hundo, post kio mi rapidege kuris al la domo, trairis la malfermitan pordon - kaj estis sekura.

Ĉio okazis en momento. Mi estis feliĉa - kontraŭe via jako ne estis tiom feliĉa, ĉar la hundo estis preninta peceton el ĝi.

Mi kuris al la telefono, kaj kvankam mia voĉo tremis, mi kapablis telefoni al la pensiono. Post kelkaj momentoj mi aŭskultis la voĉon de la inspektoro.

- Kiu vokas? li demandis.

- Mi, Poul! mi balbutis. Mi estas en la domo de sinjoro Bang - vi memoras la telefondraton super la tombaltaĵo - tiun vesperon, kiam Ellen estis murdata? Mi estas en la vilao, kies nomo estas »Paco«. Sinjorino Makir estas murdita, kaj mi havas la murdinton ĉi tie - sed rapide, ĉar eble li povos perforte eskapi - li estas en la garaĝo. Prenu aŭtomobilon! Ĉu vi komprenas?

- Mi bone komprenas - ĝis revido!

Ekster la domo la hundo bojis. El la garaĝo mi aŭdis, ke sinjoro Bang martelas per siaj manoj sur la pordon. Mi estis enfermita en la domo, sed kiom longe daŭros mia sekureco? Se fraŭlino Holt venos hejmen, antaŭ ol la inspektoro aperos, tiam mia situacio malboniĝos.

Minutoj iufoje ŝajnas terure longaj. Antaŭ multaj jaroj, kiam mi faris mian ekzamenon, mi havis la saman sperton, sed la kaŭzo tiam estis malsama.

La tempo pasis malrapide. Mi rigardis tra la fenestroj. Mi iris kaj reiris sur la planko. Ĉiumomente mi opiniis, ke mi aŭdas paŝojn malantaŭ mi. La tuta domo estis plena de fantomoj, minacantaj fantomoj. Mi jen lumigis la ĉambron, jen mallumigis ĝin.

Ekstere la vespero iĝis pli malhela. Malantaŭ la pinoj la luno leviĝis. Steloj ekbrilis el la ĉielo. La dana somernokto komenciĝis - kaj ĉi tie mi estis atendanta. atendanta...

Fine mi aŭdis aŭtomobilsirenon. Malproksime mi ekvidis lumon, fortan lumon. La inspektoro venas. Baldaŭ mi estos libera. sendanĝera.... sed kio estas tio? Iu persono venas tra la ĝardenpordo. Ĝi estas virino, fraŭlino Holt. La hundo kuras al ŝi kaj rekuras al la garaĝo. Ĝi estas inteligenta hundo, certe, sed ĝi ne scias, kian sinjoron ĝi havas. El la garaĝo venas koleraj vortoj; tra la fenestroj mi klare aŭdas ilin; ili estas blasfemoj, insultaj vortoj, minacoj.

Dank' al Dio! En la sama momento mi vidas aŭtomobilon - ne, aŭtomobilojn, ĉar estas du. Ili haltas apud la domo. kaj kelkaj personoj alproksimiĝas, inter ili la inspektoro.

Mi vidas uniformojn. Jen la polico. Kaj nun la okazaĵoj rapide sekvas unu la alian: la fidela »Urso« kuras al la policistoj por ataki ilin, sed pafo eksonas, kaj ĝi falas. Kelkaj konvulsioj, kaj ĝi estas mortinta.

Fraŭlino Holt staris ankoraŭ apud la garaĝo. Ŝia vizaĝo estis krete pala. Ŝi staris tute senmova, kvazaŭ ŝi estus ŝtona statuo.

Mi malfermis la pordon kaj kuris eksteren. La inspektoro salutis min:

- Ho - jen vi, bandito, kiu forpelis nin de niaj agrablaj seĝoj! Kio estas? Mi ne vidas murdinton, se ĝi ne estas la kompatinda hundo!

- La murdinto estas en la garaĝo, mi kriis.

Policisto iris al la garaĝo kaj malfermis la pordon. Malantaŭ li staris kvar personoj krom la inspektoro kaj ni. Mi ne plu estis sola. Nun venis mia momento de triumfo.

- Kiu estas en la garaĝo? ekkriis la policisto. En nomo de la lego: elvenu!

Sed neniu murdinto elvenis; kontraŭe elsonis kompatinda voĉo:

- Bonvenon, sinjoro policisto! Helpu min! Bandito enfermis min ĉi tie. Eble li ankaŭ rabis monon en mia domo...

Mi staris tie tute konsternita kaj aŭskultis. Ĉu mi estis idioto? Ĉu mi tute mistaksis la viron?

La policisto ridetis amike kaj respondis:

- Bonan vesperon, kara sinjoro Bang. Ĉu estas vi...?

- Jes, estas mi, sinjoro, la danĝera krimulo kaj murdinto Bang. Mi, kiu ne povas iri du paŝojn sen helpo, mi murdis junan sinjorinon.

- Sed, kara Bang, diris la policisto trankvilige - kiu parolas pri murdo?

- Sinjoro Beck, kiu enfermis min en la garaĝon. Aĥ, mi estas nur invalido, sed eĉ por invalidoj ekzistas leĝo kaj justeco en Danlando. Mi postulas kompenson por mia fidela hundo.

- Ĉarma afero, murmuris la inspektoro. Kial vi opinias, kara amiko, ke la paralizita sinjoro estas la murdinto?

Fraŭlino Holt aŭdis tiujn vortojn kaj ekkriis:

- Mia kara malsana sinjoro ne estas murdinto. Vi estas freneza, sinjoro - aŭ eble vi mem estas la murdinto.

Antaŭ kelkaj tagoj vi venis ĉi tien por telefoni. Ankaŭ tiam murdo estis okazinta. Ĉi-vespere la situacio estas simila. Laŭ mia opinio vi mem murdis sinjorinon Makir...

Elparolinte la nomon ŝi paliĝis kaj silentis.

- Ho, ho, kara fraŭlino, mi diris. Jen do ankaŭ vi ĉeestis la murdon! Sinjoroj, estas nekredeble, ke paralizita viro povus murdi iun, vi pravas - sed mi tamen kulpigas sinjoron Bang pri la murdo, kaj nun mi scias, ke fraŭlino Holt estas kunkulpulo. Paralizita viro ne povas murdi, sed ĉu sinjoro Bang vere estas invalido? Kiamaniere li do ekhavis la argilon, kiun vi povas rigardi sur liaj plandumoj? Demandu lin? Kaj eble li povas rakonti, kiel li ekhavis la sangon sur sia maldekstra pantalona kruringo? Kaj demandu al fraŭlino Holt, kiel ŝi eksciis la nomon de sinjorino Makir, kaj kiel ŝi eksciis, ke la sinjorino estas murdita...

- Li mensogas, kriis fraŭlino Holt. Mi povas klarigi ĉion...!

Kaj ŝi faris tion, kion virinoj en gravaj situacioj kutime faras: - ŝi svenis.

Sed sinjoro Bang faris gravan eraron: li forgesis sian invalidecon kaj klopodis forkuri. Okazis vera miraklo: dum unu momento li sidis kiel kriplulo en sia rulseĝo, en la posta li kuris per siaj paralizitaj piedoj for de la domo.

Kompreneble li ne venis malproksimen, antaŭ ol li estis kaptata, kaj iom poste ni ĉiuj - sinjoro Bang, fraŭlino Holt, la inspektoro, la policistoj kaj mi mem - sidis en la du aŭtomobiloj survoje for de la loko de la fortaj scenoj. Du el ni portis mankatenojn.

- Ĉi tion vi faris bonege, diris mia amiko al mi. Vi fariĝos fame konata en la tuta lando pro via heroa ago. Sed mi ankoraŭ ne komprenas, kiamaniere vi eltrovis la sekreton de nia paralizita sinjoro. Vi ekvidis argilon sur liaj plandumoj, jes, bone - sed mi ne klare vidas la rilaton al sinjorino Makir...

- La tergrundo ĉirkaŭ la tombaltaĵo konsistas el argilo. Mi hazarde rimarkis tion, kiam mi sidis tie.

- Bone, bone, vi estas Sherlock Holmes! Kaj *ni* povas iri hejmen por luli infanojn anstataŭ kapti krimulojn!

- Nu, nu, ne moku min tro multe!

- Mi diras la veron.

...Kaj mi ruĝiĝis pro fiero!

## **XIV. Kion la gazetoj skribis.**

Kara leganto! Mia rakonto estas finita, kaj tamen mi sentas, ke mi devas skribi iom pli pri la pasintaj okazaĵoj. Alie vi ne komprenus ilin. Mi mem komprenis nur malmulton, kiam mi kaptis la murdinton. Fakte mi eĉ ne estis tute konvinkita pri tio, ke li murdis la tri personojn. Mi nur ekvidis la argilon kaj la sangon kaj komprenis, ke li ne estas invalido. Li do estis trompisto - kaj de trompisto oni ja povas atendi ĉion, ĉu ne?

Nu, en la tuta afero estas multaj elementoj, kiujn vi ankoraŭ ne konas. Tial mi volas, ke vi legu, kion la gazetoj skribis pri la murdaferoj. Tie vi povas legi ion.

Mi prenas gazeton - kompreneble mi zorgeme gardas ĉiujn gazetojn de la priparolata tempo - kaj jen vi vidas:

## LA PLANTEJO-MURDINTO KAPTITA

*Kuraĝa bibliotekisto solvas la misteron.*

Fine la mistera murdafero, kiu jam longe okupas la animojn kaj timigas la gastojn ĉe unu el niaj ĉarmaj kaj idiliaj banejoj, estas klarigita - dank'al kuraĝa bibliotekisto, kiu okaze ĉeestis kiel pensionano en la bela kaj konata somerpensiono »Marbordo«.

Kiel niaj legantoj scias, okazis antaŭ ĉirkaŭ du semajnoj terura murdo. Junan fraŭlinon, Ellen Nordh, iun vesperon oni trovis murdita proksime al la pratempa tombaltaĵo en la plantejo. La murdinto ne postlasis spurojn, sed la postan tagon la polico arestis junan sinjoron nomatan Hansen, kiu dum la juĝesploro implikis sin en kontraŭdirojn.

### *La dua murdo - kaj la tria.*

La polico eltrovis, ke la murdo estis farita per speciala ponardo, sed la arestita Hansen persiste neis posedi tian ponardon. Malgraŭ esploroj la ponardo ne estis trovata, kaj subite okazis murdo numero du. Ĉi-foje estis juna sinjoro, nome kortservisto de la pensiono »Marbordo«, kiu estis murdata, kaj la mortigilo estis denove la mistera ponardo.

Kelkaj tagoj pasis, kaj murdo numero tri okazis. Sed la saman vesperon konata bibliotekisto, sinjoro Svend Beck, promenis al la murdloko, kaj li estis la unua, kiu konstatis ĉi tiun murdon...

Mi preterlasas la priskribon de la okazaĵoj, kiujn la legantoj konas, kaj daŭrigas laŭ la gazeto:

### *Nekredebla antaŭhistorio.*

Post mallonga tempo la teknika fako de la polico montris, ke la sango sur la pantalono de la arestita Bang certe estis sango de la murdita sinjorino Makir, kaj tio devigis lin konfesi la murdon.

Sed dum kelkaj tagoj li tute ne volis konfesi la aliajn murdojn, persiste asertante, ke li scias nenion ajn pri ili.

Sed intertempe oni eltrovis, ke li ne nur estas trompanto rilate al sia invalideco, sed li eĉ ne estas - sinjoro Bang. La vera Bang estis maljuna viro, sed la kaptito havas nur ĉirkaŭ kvindek jarojn.

Nova mistero: kie estas la vera Bang, kaj kiu estas la trompanto? Ĉi tie fraŭlino Holt subite ekhelpis la policon.

Ŝiaj nervoj rompiĝis dum la juĝesploro, kaj kun voĉo sufokita de ploro ŝi rakontis nekredeblan historion. nekredeblan, jes, sed veran.

### *Fraŭlino Holt rakontas.*

Antaŭ tri jaroj fraŭlino Holt venis kiel mastrumistino kaj flegistino al la vera sinjoro Bang, kiu estis honesta viro sesdekjara kaj invalida. Li ankaŭ estis tre riĉa, kaj tio estis la malfeliĉo, ĉar la fraŭlino baldaŭ elpensis ruzan planon: Ŝi konis viron sen skrupuloj, eksakoron, kiun ŝi amis, kaj kune kun la amato ŝi mortigis la paralizitan

sinjoron, post kio la amanto, kies nomo estas Makir, fariĝis la invalida sinjoro Bang.

Tio sonas kiel kriminalromano, kaj ĝi estas kriminalromano, sed bedaŭrinde el la vera vivo. Bang - la vera - estis kvieta, homevitema viro. Neniu konis lin. Li ne havis familion, sed estis tute sola en la mondo.

Kapabla aktoro tre facile povas ŝanĝi sian eksterajon. - Tiu sufiĉis. Nova sinjoro Bang sidis en la rulseĝo. Ĉiu povas sidi en rulseĝo, kvazaŭ li estas paralizita, kaj la amika flegistino helpis sian kompatindan mastron! La plano kompreneble estis, ke post kelkaj jaroj la du bonaj kamaradoj forvojaĝos al fremda loko aŭ fremda lando por ĝui la fruktojn de la krimo - dum kiam la kadavro de la vera sinjoro Bang kuŝis sekrete ie en la ĝardeno profunde sub la tersurfaco.

### *Kalkulo sen la familio.*

Sed okazis alie. Kaj la kaŭzo estis - la kara familio. Fratino de Makir hazarde venis al »Marbordo« kaj rekonis fraŭlinon Holt. La du turtoj ne ŝatis tion - ĉefe pro tio, ke ankaŭ la kara fratino komprenis la valoron de mono, kaj deziris havi parton de la ŝtelita riĉaĵo.

Kaj tiam la kortservisto John suriris la scenejon. Li estis dum multaj jaroj tre sperta falsisto, ŝtelisto k. t. p., kies nomon - la veran nomon - la polico en multaj landoj tre bone konas, li estis efektive la edzo de la kara fratino Makir, sed iliaj reciprokaj sentoj plej ofte estis iom malvarmaj.

Sed la bonaj geedzoj nun interkonsentis pri tio, ke frato Makir devas doni al ili rimarkinde grandan parton de la mono. Sinjorino Makir skribis al sia edzo, kaj li respondis tre volonte. Kune ili iris al la paro en la somerdomo por postuli valoran sumon, sed la fidela hundo »Urso« renkontis ilin, kaj ili estis devigataj iri returne sen rezulto.

Post tio ili skribis kelkajn minacleterojn, kiujn la polico trovis en la domo, kaj John venis al la pensiono kiel kortservisto; kompreneble la nomo John estis falsa.

### *Ellen Nordh.*

La murdo de Ellen Nordh estas ne nur tragedio, sed vera, neintenca eraro. Makir skribis al sia fratino, ke li konsentas renkontiĝi kun ŝi kaj doni al ŝi sumon da mono. La kunvenejo estis la pratempa tombaltaĵo. Malfeliĉe Ellen Nordh estis tie la saman tagon. Ŝi kuŝis sur la verda herbo, kaj Makir, kiu ŝteliris de malantaŭ la tombaltaĵo, kredis, ke ŝi estas lia fratino - kaj murdis ŝin.

Hansen, kiu estis arestita, jam antaŭ longe liberiĝis. Li estas tute senkulpa kaj scias nenion pri la familio Makir...

Ĉi tio laŭ la gazeto. Kiel Makir poste murdis John kaj sian fratinnon, vi certe mem povas diveni. Kion mi ne povas kompreni, estas, kial sinjorino Makir (mi forgesis ŝian edzinan nomon) lastfoje venis al la tombaltaĵo. Eble ŝi opiniis, ke ŝi malgraŭ ĉio sukcesos persvadi la fratinnon, ke li donu al ŝi monon. Eble li skribis tion al sia fratino aŭ telefonis al ŝi. Neniu tion scias escepte de la frato - kaj li ne rakontis tion.

Sinjorino Makir ne estis timema virino. Tion oni devas konfesi!

## XV. Ĉu la inspektoro havu la lastan vorton?

Ĉu vi estas kontenta, kara leganto? Aŭ ĉu mi forgesis ion? Ho jes, mi forgesis la leŭtenanton. Sed kial miksi lin en la aferon? Li estis malgranda homo, certe, sed li ja nepre ne kulpis pri la murdo. Ni diris nenion pri sinjoro Breme al la polico.

Sed la ponardo? Kie estis la fatala ponardo, per kiu la murdoj efektiviĝis? Eble vi ne primeditis tion, sed la ponardo ja estos tre grava objekto en la tuta afero. - La polico trovis ĝin kaŝita en la tombaltaĵo.

Monavido povas konduki homojn al teruraj agoj. Tion ni ĉiuj scias, sed la malnova vero ĉiam konfirmiĝos: »Ĉion, kion oni semas, tion oni ankaŭ rikoltos«. La krima paro estis kondamnata al grava puno. En Danlando ni ja ne havas mortpunon, sed anstataŭ tion ni havas vivdaŭran punon malliberejan.

La idilio revenis al la pensiono, al la bela, ombra ĝardeno, en kiu ni ĉiuj sidis ĝuante la pacon, la ferion, la tuta danan atmosferon.

- La vivo estas bela kaj bona! ĝemis sinjorino Kink, rigardante al la feliĉa Jensen.

- Jes, respondis la inspektoro, la arbaro estas verda, kaj ĉiuj virkaproj estas for...!

Sinjorino Kink ruĝiĝis, kaj Jensen ekstaris iom nerveze.

- Mi pensas pri malfeliĉa kortservisto John, diris juna fraŭlino. Fakte li estis tre bela. Oni ne pensus, ke li estas krimulo.

- Aŭdante pri John, la inspektoro diris, mi ekmemoras ion tre interesan el mia restado sur Bermuda-Insuloj.

- Jes, rakontu, kara inspektoro! kriis la sinjorinoj, ion amuzan!

- Jes, volonte, karaj sinjorinoj, sed unue mi devas diri, ke la vivo ofte superas la fantazion. Tio estas fakto, kion multaj homoj scias. - Nu, kiel vi scias, mi antaŭ multaj jaroj pasigis longan tempon sur la Bermuda-Insuloj, kaj tie mi tre ofte travivis strangajn aferojn. Interalie mi vidis la kazon pri John...

La inspektoro trinkis el sia glaso kaj daŭrigis:

- John estis asistanto de unu el miaj bonaj amikoj, kiu posedis grandan bienon. Ne tre inteligenta estis John, sed fidela kaj laborema, kaj dum multaj jaroj li estis en servo ĉe mia amiko.

Iun tagon li laboris en la pajlejo, kie li distranĉis pajlon per malnova pajlhaka maŝino. Kiel dirite, li absolute ne estis elpensinta la pulvon, kaj laborante li tro proksimiĝis al la maŝino, kiu subite kaptis lin kaj - detranĉis lian postaĵon .

Ĝi estis terura akcidento. Li sangis multege, kaj mia amiko timis, ke li mortos, sed plej rapide oni venigis spertan kuraciston. Eble mi iam rakontis pri ĉi tiu kuracisto, kies nomo estis Jackson. Kion li ne sciis pri malsanoj, tion ne estas menciinda.

Li tuj venis kaj esploris la vundon.

- Estas tre grave, li diris, tre grave! Mi ne scias, ĉu mi povas savi lin, sed mi klopodos. - Venigu rapide vian plej bonan bovinon!

Mia amiko faris tion, kaj la kuracisto metis la malfeliĉan John sur tablon, malinfektigis la vundon, prenis

sian operacian tranĉilon, fortranĉis la mamon de la bovino kaj kudris ĝin sur la vundon...

Ĉio okazis tiel rapide kiel fulmo.

- Nu, la kuracisto diris, se tio ne sukcesos, ĉiu espero estos for! Sed mi kredas, jes, mi kredas...

Mia amiko kaj lia edzino tre multe miris pri tiu metodo - sed ĝi efektive sukcesis. Post kelkaj tagoj la malfeliĉa John resaniĝis. Vera miraklo kaj atesto pri tio, ke la kuracista scienco kelkfoje montras sin nekompreneble granda.

Sed ankaŭ alia miraklo okazis: resaniĝinte la bona kaj fidela John kapablis liveri ĉiutage dudek kilogramojn da lakto....

\*\*\*

La inspektoro silentis kaj suĉis sian cigaron. La aŭskultantoj ridis, kaj sinjorino Kink - pensinte longe kaj grave - diris:

- Mi ne povas kredi tion! Dudek kilogramojn - tiom li absolute ne kapablis produkti!

Kiam ĉiuj ridegis, la inspektoro moke diris al mi:

- Ĉu ankaŭ vi, kara amiko, ne kredas je tiu mirakla metodo?

Kaj tiam mi gajnis la lastan vorton, respondante:

- Mi nepre kredas je ĝi, kara Poul. Ĝi estas same bona kiel - via Rorschach-metodo!

*FINO.*